



NORDHUNGARIA INFORMO

*Informilo de „Király Lajos” Esperanto - Amika Rondo
Miskolc*

Julio – Aŭgusto - Septembro 2012-a

6a jarkolekto nro 83-85

Enhavo

Julio, aŭgusto, septembro	3
Interesaĵoj- Jardatrevenoj	3
Esperanto iĝos integra parto de Android-telefonoj	6
Raporto	6
Pri la 97 jara Esperanto Mondkongreso en Hanojo, 2012.....	8
Mesaĝo de Louis Christoph ZALESKI-ZAMENHOF al la 97-a UK.....	8
Pensoj	11
Ni funebras	11
Forpasis sinjoro Attila Makai	12
„Pál, István”	14
Leterkesto	16
La Beaŝ-aj lingvoj	21
Hungaraj sukcesoj dum la 30a Somera Olimpio	33
La 20a de Aŭgusto.....	34
Preparo de glaciaĵo kaj parfeo	34
Mia Avino	34
Pri la kiso.....	37
Flavaj kuboŝtonoj	37
Operludoj en Miskolc en dua duono de la 20a jarcento	41
Aldono	42
Ŝercoj.....	44
Vidor (Bonhumura) – Festivalo en urbo Nyíregyháza.....	44

Julio, aŭgusto, septembro



Aŭtuno – arbfolioj sur musko

Laŭ la malnova hungara kalendaro, **julio** estas monato de beno, **aŭgusto** estas monato de la nova pano, kaj **septembro** estas monato de Patrino Tero.

Interesaĵoj- Jardatrevenoj

Sciu, ke la **holocena kalendaro** estas nomo de sistemo de jarkalkulo bazita sur la koncepto de holocena erao (HE), ankaŭ nomata homa erao. Ĝi celas solvi iujn problemojn kaj mallogikaĵojn de la nuntempe uzata gregoria kalendaro. La holocena kalendaro difinas kiel komencon de la erao la jaron 10 000 antaŭ Kristo. Ĝi do funkcias tiel, ke al jarnombro kristana oni aldonu nombron dek mil. Ekzemple, la jaro 2012 post Kristo (p. K.) estas jaro 12012 de Holocena Epoko (HE). La sciencisto Cesare Emiliani unue proponis la holocenan kalendaron en 1933. Vidu plie, la retejon: http://eo.wikipedia.org/wiki/Holocena_kalendaro. Laŭ la **holocena kalendaro** ni skribas nun la jaron 2012-a.

Oni malkovris restaĵojn de kvindek milion jara fiŝmonstro. /Fonto hungare: <http://richpoi.com/cikkek/rudomany/otvenmillio-eves-halszorny-maradvanyait-tartak-fel.html>

„**La 21-an de aŭgusto proksimume je la 18a- horo** eblis atenti sur la okcidenta horizonto, la kune eston, unu apud alia la plej brilajn stelojn de la Luno, Marso Saturno kaj la Virgo-stelaro. Ĉirkaŭ la grandioza Jupitero ĉirkaŭiranta 4 plej grandaj, t.n. Galileo-luno sisteme kaŭzas sur la planedo kiel nigraj makuloj atendeblajn suneklipsojn, en ombro de la planedo luneklipson.” - komunikis la sekva komunikado:

Fonto hungare <http://richpoi.com/cikkek/tudomany/rengeteg-hullocsillagra-szamithatunk-augusztusban.html>

La Internacia Astronomia Unio akceptis nomproponojn por 25 etaj planedoj, kiujn Hungaroj malkovris. Inter aliaj asteroidojn ricevis Zoltan Bay, Éva Ruttkai, Johano Apáczai Csere, Alfréd Hajós kaj Bertalan Farkas.

/Fonto hungare: <http://richpoi.com/cikkek/tudomany/hires-magyarokrol-neveztek-el-kisbolygokat.html>

Ĉi-jare festas 120. naskiĝdatrevenon la hungardevena fromaĝo de Pálpusztá, la pikantgusta laktaĵo, kiu apartenas inter la hungarajn produktojn. La fromaĝdelikataĵo kapablas konkuri kun la mondfamaj nederlandaj kaj francaj produktaĵoj.

Fonto hungare: <http://richpoi.com/cikkek/izvilag/hungarikum-rangra-palyazik-a-120-eves-palpusztai-sajt.html>

Laŭ kalendaro-Gregorio: antaŭ 740 jaroj iĝis reĝo László la 4-a (1261-1290), kiu reĝo estis inter 1272-1290. Li ne povis venki kontraŭ la ĉefnoblulaj grupoj. Jam la infanaĝa reĝo eskapis al sia Kun-a (Kumano-devena) popolo, estante sia patrino Kumano-devena (Kumanoj estis peĉenegaj popolfragmentoj). Tie li povis vivi liberan vivon. Pro tio oni nomis lin kiel László Kun. Fine kumanaj atencantoj mortigis lin. Oni tombigis lin en Csanád. Pri lia vivo plie vidu ĉe [http://eo.wikipedia.org/wiki/Ladislao_la_4-a_\(Hungario\)](http://eo.wikipedia.org/wiki/Ladislao_la_4-a_(Hungario))

110 jaras la Punto de Halas (halaŝ)



La registrita fabrikmarko de la punto de Halas

„Viva tradicio de puntofaro de Halas estas de 2010 parto de la hungara Spirita kultura heredaĵo!

En suda parto de Hungarujo situanta malgranda urbo – sole en la lando kaj mondo - la puntofaro de Halas havas pli ol cent jaran tradicion.

La punto de Halas iĝis inda konkuranto de la punktoj de Bruselo kaj Venecio dum la pasinta jarcento, ĉi tiel ĝi eternigis la bonan famon de la hungara artindustrio.

La punto de Halas estas nur tute kun manlaboro farita kudrita punto, kies faro estas tre ege subtila kaj longdaŭra laboro.

Niajn punktojn ni faras laŭ la jarcentaj desegnaĵoj, uzante originalajn motivojn per 60 diversaj kudrmodeloj, - kiujn nur dek puntofarantoj konas – kudras, sed ni volonte plenumas ankaŭ la individuajn mendojn.

La tri sur unu la alia kuŝantaj fiŝoj estas la varmarko de punto de Halas de 1935.

De 1902 pluraj famuloj de la mondo ricevis punton de Halas kiel donaco de la hungara ŝtato.

En 1996 papo Johano, la 2-a kaj en 2000 Hitachi, japana princino.

En 2004 edzino de prezidantoj de Respublikoj de Libano kaj Cipro, la japana imperiestrino kaj Elizabeta, la 2-a, brita regantino, en 2006 edzino de G. Bush, prezidanto de Usono. En 2008 reĝino de Jordano ricevis donace punton de Halas.

Ni faris ankaŭ blazonon de pluraj hungaraj kaj eksterlandaj urboj kaj familioj kaj institucioj volonte donacas punton de Halas por premii privatpersonojn.

Helpe de Kultura Ĉefplaco de la Ministerio pri eksteraj aferoj nia punto jam de 2001 estas sistema ĉefrolanto de la kulturaj aranĝaĵoj, kiuj rolas en la internaciaj diplomaciaj aranĝaĵoj kaj la punto estas trovebla sur la diplomaciaj donaclistoj.

La puntomuzeo (malfermita estas ĉiutage krom sabato kaj dimanĉo inter la 9-12 horoj kaj 13-16 horoj kaj inter 1. aprilo kaj 30. septembro: ĝis 17. horo, inter 1. jan kaj 15. marto) estas rigardebla la estinto kaj nun de punto de Halas. La gevizitantoj povas eniri en la kudrejon atenti persone la puntofaron de Halas, kiu pretendas bonajn okulojn kaj grandan toleron.

Historion de punto de Halas detale prezentas tiu t.n. „kofro-ekspozicio”, kiu enhavas dek tabelojn kaj 28 punktojn kaj kun tiu ĉi ekspozicimaterialo oni volonte prezentas sin en kiuj ajn lokoj de la lando.



La bildojn kaj informojn pri la punto de Halaŝ, sendis Suzana Kiliti, direktorino de la Puntomuzeo./

Tekston de Suzana Kiliti esperantigis László Pásztor

Antaŭ 100 jaroj naskiĝis Jozefo Bakos, kulturhistoriisto, lingvisto, instruisto (2. februaro 1912. – 7. aŭgusto 1997.) Li okupiĝis kaj pri la hungara lingvohistorio, lingvoevoluo, lingvoinstruado kaj lingvoortografio... ktp kaj pri samaj verkaĵoj de Johano Ámos Komenius.

20. jara estas la Asocio de la Hungaraj Pupteatristoj! Ilia rezidej-adreso estas: 1068. Budapeŝto, Urboboska aleo 38. Jaro de fondo de la societo estas jaro 1992. Celo de la societo: por arigi la sisteme profesie agadajn pupteatristojn en organizaĵon kaj formulado, defendo kaj reprezentado de iliaj komunaj fakaj interesoj.

Fonto hungare ĉe:

http://www.babmuveszszekszovetsege.hu/main.php?lang=HUN&disp=add_menu&ID=23

Esperanto iĝos integra parto de Android-telefonoj

<http://www.liberafolio.org/2012/esperanto-igos-integra-parto-de-android-telefonoj>

/Ret-INFO: <http://www.eventoj.hu>

Raporto

pri la 44. Landa Fervojistaj Esperanto-Renkontiĝo aranĝita en urbo Szeged

de la 29-a de junio 2012 ĝis la 1-a de julio 2012



La partoprenantoj. Fotis: Stefano Ŝutka

Antaŭ ol mi estus farinta ĉi tiun mallongigan resumon, mi trarigardis historion de la landaj fervojistaj renkonkotiĝoj ĝis jaroj 1988. Pro tio mi devis agi tiel, ke mi informu pri la sekvoj: La Fervojistaj Esperanto-Baza-organizaĵo jam trifoje (en 1988; 2002; 2012) aranĝis landan renkontiĝon de la fervojistaj geesperantistoj. En 1988 kaj en 2002 ni aranĝis tiujn en Kiskunhalas kaj la nunjara en urbo Szeged. Krom ni ankoraŭ 9 grupoj aranĝis similajn renkontiĝojn de jaro 1988. La Pécs-anoj kaj la Tata-anoj - same kiel ni - trifoje, la aliaj pli malmultoble entreprenis ĉi tiun grandan laboron.

Multflankecon de la tasko montras, ke dum la organizo de renkontiĝo en Szeged, mi devis iri al Szeged en 2011 duoble, en 2012 trioble por aranĝi perfekte la dormejon, manĝadon kaj la diversajn programojn. Krom tio ĉi mi skribis trifoje petleterojn al la urba trafikaj entreprenoj kaj al la urba konsilio por peti helpon por uzi senpage dum la renkontiĝo la tramon kaj por meti reklamfoliojn en la urbo. Bedaŭrinde miajn petojn oni rifuzis.

Por organizi la renkontiĝon help-donis inter aliaj Ildiko Ferenczi loĝanta en Szeged kaj Jozefo Baksa (esperantigoj de aliĝiloj, programoj kaj prelego de sinjorino Tibor Székely, akceptoj de la Belgrad-anoj, aĉeto de flugfolioj, saketoj, ktp.) Helpis ankaŭ miaj filino kaj kuzo vivantaj en Szeged kaj tiuj miaj membrokunuloj, kiuj persone partoprenis la renkontiĝon. (10 personoj.) Ni ricevis helpon ankaŭ de la Landa Fervojistaj Asocio, kiu helpis informi la eksterlandajn organizaĵojn pri la renkontiĝo.

Dum la organizado ni provis konstati la partoprenkotizojn kaj la kostojn de la priservadoj, ke ili estu kiel eble la plej malaltaj, akcepteblaj. Ĉi tiel povis okazi, ke la kosto de la partopreno en la tuta programo; la du noktaj dormejoj kaj la sesobla manĝado kostis por fervojistoj 14350.-forintoj por la pluraj 15150.- forintoj. Dum la renkontiĝo en Pécs ĝi estis 17420.- forintoj kaj tie ne estis interkona balo, kiu iome multekostigis (per 13000.- forintoj)

nian sabatvesperon. En intereso de plibonigo de la etoso de la gepartoprenantoj ni certigis daŭre la drinkadon de la kafo, antaŭ la manĝadoj la aperitivojn, dum la vespermanĝo de la balo blankan kaj ruĝan vinojn kaj refreŝigajn trinkaĵojn /(mineralakvojn) ni donis al la gastoj. Al la pertrama trafiko ni donis senpage biletojn por veturi kiuj bezonis biletojn.

Ĉiujn alvenantajn gastojn ni akceptis persone en la aŭtobus,- kaj fervojstacidomo. En la fervojstacio per megafono ni salutis la alvenantajn gastojn hungar,- kaj esperantlingve. Kiu malfacile kapablis piediri, tiun per aŭtomobilo ni transportis al la proksima dormejo.

En kadro de la programo vendrede kun fremdulgvidanto ni rigardis la preĝejon Sankta Promeso kaj ĝian subpreĝejon, krome en la najbare staranta Biblioteko „Somogyi” aranĝitan ekspozicion pri Julio Baghy kaj en la restoracio de la dormejo elkonstruitan fervojhistorian afiŝekspozicion. Post vespermanĝo la vidvino de la mondvojaĝanta esperantisto Tibor Székely faris prelegon kun lumbildprojekciado por ni pri riĉa kaj varia vivo de ŝia edzo.

Sabate post anticipa informigo mi rigardis konstantan ekspozicion de Muzeo „Móra Ferenc” kaj tie ankaŭ ekspozicion de Mikelo Munkácsy. De la muzeo ni promenis al la t.n. „Nigra Domo” (ĉe anguloj de stratoj Somogyi kaj Zrinyi), kie krom la ekspozicio pri la teatraj aktoroj Manyi Kiss kaj Rodolfo ni rigardis popolkostumojn de la hungara Sud-Ebeno prezentantan ekspozicion.

Post la ege abunda tagmanĝo (la plej granda parto de la partoprenantoj ne kapablis manĝi la tutan dozon) proksimume de la 16-a horo dum somerkulmino nia grupo ĉirkaŭ 60 persona vizitis la faman Zooĝardenon.

Post la tre bongusta vespermanĝo danca distriĝo sekvis, kiu daŭris preskaŭ ĝis noktomezo. La muzikon por danci per estigo de elektraj muzikvoĉoj certigis Jozefo Míg, muzikisto de Ásotthalom (aŝotthalom).

Post la dimanĉa matenmanĝo /(sveda-tabla maniere) per malgrand-vagonara urborigardo daŭriĝis la programo. Dumvoje la malgranda trajno preteris naskiĝdomon de Julio Baghy (ĉe angulo de stratoj Teleki kaj Sôhordó). Sinjorino Vágó Suzana Bárány diris primemoron pri Julio Baghy, aprecante lian verkaron. Poste ni florkronis la memortabulon estantan sur la domo. Post la urborigardo laborkunsido okazis, dum kiu ni preparolis la movadajn aferojn. Fine de la laborkunsido la geedzoj Baksza de Vác anoncis, ke ili entreprenas la organizadon de la sekva 45. Landa Fervojista Esperantista Renkontiĝo.

Post la laborkunsido sekvis tre bongusta tagmanĝo kaj poste la adiaŭado kaj hejmenveturo de la partoprenantoj.

Fine ni povas diri, ke multe da partoprenantoj kaj persone kaj retmesaĝe mesaĝis, ke spite de la somerkulmino la renkontiĝo estis sukcesa kaj la tie aperintaj 76 ĉeestantoj povis hejmeniri riĉiĝinte kun multe da travivaĵoj. Ankaŭ pro ĉi tiuj bonaj opinioj ni dankas la helpoj de ĉiuj organizantoj kaj kunlaborantoj!

Kelebia, 10. 07. 2012.,Stefano Sutka, baz-organa prezidanto

Pri la 97 jara Esperanto Mondkongreso en Hanojo, 2012

<http://esperanto.cri.cn/581/2012/07/29/1s138960.htm>

Je la 10a horo de la 29a de julio laŭ la loka tempo, inaŭguriĝis la 97-a Universala Kongreso en la vjetnama ĉefurbo Hanojo sub la patroneco de vicprezidanto de la Socialista Respubliko de Vjetnamio Nguyen Thi Doan. Prezidanto de Universala Esperanto-Asocio Probal Dasgupta prezidis la inaŭguron. Sub la ĉeftemo "Esperanto - Ponto al Paco, Amikeco kaj Disvolviĝo" kolektiĝas pli ol 850 samideanoj el pli ol 60 landoj, kaj ĉirkaŭ 550 homoj ĉeestis la inaŭguron. Tuj post la malfermo komenciĝis diversaj programeroj. La unua kunsido pri Kongresa Temo enkonduke emfazas, ke se Esperanto estas ponto, ĝi estas ponto ne jam finita, sed ankoraŭ konstruata. Kaj ni mem estas la konstruistoj. En tiu tago, ankaŭ inaŭguriĝis Internacia Kongresa Universitato. De lundo ĝis vendredo okazados kunsidoj kaj prelegoj.

(De: Neide Barros Rêgo <neide.barros@terra.com.br>)

Mesaĝo de Louis Christoph ZALESKI-ZAMENHOF al la 97-a UK

Estimata Sinjorino Alta Protektanto,
Sinjoro Prezidanto,
Estimataj Gekongresanoj,
Geamikoj tre karaj,

vi kunvenis laŭkutime en la centro de Esperantujo, situanta ĉi-jare malproksime laŭ distanco, tamen ĉiam proksime al mia koro.

Dum via Kongreso vi debatos pri la ponto al paco, al amikeco kaj al disvolviĝo, temo por mi, pontokonstruisto, aparte interesa, precipe pro la nomo de tiu ponto: **PONTO ESPERANTO!**

Tial mi komprenis, ke elektinte siatempe mian inĝenieran profesion, mi neniel perdis la kuracistan tradicion de la familio. Ne, mi ĝuste sekvis la Avon, kiu ja prezentiĝas kiel la inĝeniero de tiu ponto ... laŭ ekzistanta tradicio, la inĝeniero staras sub sia ponto, kiam la unua trajno aŭ la unua ŝarĝaŭto ĝin trapasas. mi ĉiam sekvis tiun tradicion kaj mi konsideras, ke sekvis ĝin ankaŭ mia Avo. Ĉar li daŭre estas vivanta en la koro de ĉiu esperantisto, ni povas konkludi, ke la Ponto Esperanto neniam rompiĝis kaj daŭre nin kondukas al paco kaj al amikeco!

Mi forte deziras al la Kongreso, ke ĝiaj debatoj estu fruktodonaj kaj kreu favoran eĥon tra la mondo.
Ludoviko K. ZALESKI-ZAMENHOF

(Kongresa Kuriero nro 4 [http://www.uea.org/pdf/Loa!-4\).pdf](http://www.uea.org/pdf/Loa!-4).pdf))

Provizora teksto de la kongresa rezolucio

Tradicie, en la fermkunsido de la kongreso oni prezentas tekston de kongresa rezolucio, kiu estos la oficiala deklaro de la kongreso al ekstera publiko. Ĉi-jare la komisiono pri la kongresa rezolucio (komitatanoj Mark Fettes, Amri Wandel kaj Mireille Grosjean) pretigis tekston ĝustatempe por pritrakti kaj plibonigi ĝin en la lasta kunsido pri la kongresa temo. Kvankam la rezolucio ankoraŭ atendas la aprobon de la Komitato de UEA vendredon matene, ni publikigas ĝin ĉi tie kun alvoko al la kongresanoj:

Traduku ĝin en vian lingvon! La teksto enhavas nur 200 vortojn kaj ne estas malfacila. donu vian tradukon (tajpitan aŭ en tre klara manskribo) al la oficejo de la Kuriero, aŭ sendu ĝin per reto al la adreso: doi-cik@seaple.icc.ne.jp, ni poste disponigos la tradukojn en la retpaĝoj de la kongreso. /Mark Fettes



Somero en Hanojo

<http://www.97uk-hanojo.com/index.aspx>

125-jara Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo

Kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto 2012, pli ol 800 partoprenantoj en la 97a Universala Kongreso de esperanto rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco kaj reciproka respekto. Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, esperanto proponas praktikan kaj potencon rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo. Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj. Por internacia komunumo kiu klopodas realigi la jarmilajn evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj nacioj, esperanto proponas kompletigan evoluvojn al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj.

Rezultoj de la Belartaj Konkursoj
de UEA en 2012

POEZIO:

1-a premio: Aleksandro MITIN (Rusio) pro “Inspiro”;

2-a premio: ne aljuĝita;

3-a premio: Timothy Brian CARR (Britio) pro “La arto de la Poezio” kaj Luiza CAROL (Israelo) pro “Kandanco”;

Honora mencio: Aleksandro MITIN (Rusio) pro “Rivero Honto” kaj Jesper JACOBSEN (Francio) pro “Homsaĝo”.

(Partoprenis 43 verkoj de 22 aŭtoroj el 14 landoj.)

PROZO:

1-a premio: Sten JOHANSSON (Svedio) pro “Tri legendoj”;

2-a premio: Ewa GROCHOWSKA (Francio) pro “Sabla reĝlando”;

3-a premio: Sten JOHANSSON (Svedio) “Vasta domo”;

Honora mencio: Lena KARPUNINA (Rusio) pro “la amnestipeto” kaj Jesper JACOBSEN (Francio) pro “Subtenu min”.

(Partoprenis 21 verkoj de 15 aŭtoroj el 11 landoj)

ESEO:

Premio “Luigi Minnaja”: Sten JOHANSSON (Svedio) pro “Ivan Ŝirjaev – La evoluo de verkisto” kaj Luiza CAROL (Israelo) pro “La puzlo pri la elefanto”;

2-a premio: ne aljuĝita;

3-a premio: Aleksandro MELNIKJOV (Rusio) pro “Leksikaj novismoj kaj neologismoj: anatemi aŭ odi?”;

Honora mencio: Sten JOHANSSON (Svedio) pro “Ĉu fundamenta evoluo aŭ neologisma glosolalio?” kaj Brandon SOWERS (Usono) pro “Perspektivoj pri esperanta kinarto”.

(Partoprenis 12 verkoj de 8 aŭtoroj el 7 landoj)

TEATRAĴOJ:

1-a premio: Carmel MALLIA (Malto) pro “Najbaroj”;

Honora mencio: Adrienne PÁSZTOR (Hungario) pro “Ombro en lumo” kaj Jose Eduardo Rosa CRISPIM (Portugalia) pro “Fetorafero”.

(Partoprenis 4 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj)

INFANLIBRO:

Premio “Infanlibro de la Jaro”: eldonejo Pro100 (Pollando) pro “Kato Koloro” de Moises Gutierrez RAIMUNDEZ, tradukita de Przemysław WIERBOWSKI.

(Partoprenis 6 verkoj de 6 eldonejoj el 6 landoj)

PREMIO “NOVA TALENTO”

Jesper JACOBSEN (Francio)”

Ni geesperantistoj de la mondo esperas, ke la per Honora-mencio premiitajn verkojn UEA ne ĵetos denove en paperkorbon kiel ĝis nun faris. La verkistoj meritas, ke ilin kaj iliajn verkojn ekkonu la esperantistaro de la mondo. Ni esperas, UEA vere trovos konvenan lokon aperigi ankaŭ la verkojn premiitajn per honoraj mencioj, eĉ rete, kaj la verkoj estos konservitaj en la Biblioteko Hector Hodler – kiel promesis tiujn sinjoro Osmo Buller, direktoro de CO.de UEA. Mi mencias, ke sinjorino **Adrienne Pásztor** verkis teatraĵon (*Ombro en Lumo*) kies agado okazas en la 19. jarcento-meza afrika ŝtato; en Benino alinome en „Fon-Dahomeo”. Tre taŭga estus, ke ankaŭ ŝian verkon ekkonu la afrikanoj, por ke ĝi povu instigi ilin verki similajn aŭ pli bonajn literaturaĵojn.

<http://www.liberafolio.org/2012/sten-johansson-gajnis-pli-ol-duoble>

László Pásztor nome de multaj aliuloj

Raporto de UMEA-kunveno

Ĵaŭde je 11:00 –12:00 okazis la jarkunveno de UMEA (Universala Medicinista Esperanto-Asocio). La eventon salutis estrarano Amri Wandel, emfazante, ke UMEA estas la dua laŭ la nombro de anoj el fakaj organizoj, kiuj laboras. Kvankam neniu el la estraro de UMEA povas partopreni la UK-on, la prezidanto komisiis min gvidi la kunsidon. Unue ĉ. 30 partoprenantoj aŭdis leteron de la *honora prezidanto d-ro Imre Ferenczy*, kiu informis pri la okazinta Internacia Medicinista Esperanto-Konferenco en Opava, Ĉeĥio, kaj pri novelektita estro, *Nova prezidantino estas d-rino Eva Kopečna el Ĉeĥio*. Due oni diskutis pri tradicia orienta medicino kaj esploroj – pri tiuj ĉefe en Slovakio, kiu estas malgranda lando, sed kun longa historio de uzo de orientaj kuracmetodoj. en Slovakio akupunkturo estas jam longe oficialigita fako de medicino kaj ankaŭ esploro pri modernaj rimedoj donas rezultojn./Teodor Rosinsky (Kn: 269)

/Kongresa Kuriero de la 97 a Universala Kongreso en Hanojo, Vjetnamio **N-ro 62012-08-03/**

Kongresa Rezolucio125-jara, Esperanto konstruas pontojn al pli justa kaj paca mondo-Kunvenante en Hanojo, Vjetnamio, de la 28a de julio ĝis la 4a de aŭgusto, 2012, pli ol 800 partoprenantoj en la 97a Universala Kongreso de Esperanto rekonfirmas la gravecon de lingvo konstruita sur la idealoj de paco, amikeco, kaj reciproka respekto. Por homoj el ĉiuj landoj kaj vivofonoj, Esperanto proponas praktikan kaj potencon rimedon por rekta kontakto, reciproka interkonatiĝo kaj profunda amikiĝo. Por mondo kie ankoraŭ abundas konfliktoj kaj maljustaĵoj, Esperanto proponas kulturon de paco, kiun kunkonstruas en egaleca etoso homoj el ĉiuj kontinentoj. Por internacia komunumo kiu klopodas realigi la Jarmilajn Evoluigajn Celojn de Unuiĝintaj Nacioj, Esperanto proponas kompletigan evoluvojon al tutmonda partnereco, en kiu kunlaboras ne nur ŝtatoj kun ŝtatoj, sed homoj kun homoj. 125 jarojn post sia apero, Esperanto estas ĉiam pli vaste uzata kiel ponto al amikeco, paco, kaj disvolviĝo – evoluo akcelata per la disvastiĝo de alia tutmonda komunikilo, Interreto. Tion oni vidas interalie per la ĉi-jara aldono de Esperanto kiel 64a lingvo en la ret-tradukilo de Google. Ni invitas homojn el iuj landoj utiligi kaj kunkonstrui tiun ponton, cele al pli justa kaj paca mondo, kie disfloras ĉiuj lingvoj kaj kulturoj.

/Sendinto Aloísio Sartorato – Brazilio/

Pensoj

La laboro vivigas la homon, sed la ripozo mortigis nenium.

Vivu trankvile, ne laboru multe! Ĉar vi rimarkos tion, ke dimanĉe ĉiuj homoj kantas en la templo nur vi kuŝas silente sur via dorso.

Se viaj malamikoj estas en pafdistanco, tiam ankaŭ vi estas tie.

Kiu ridas lastfoje, tiu havas obtuzan intelekton.

En la ĝangalo ĉio estas manĝebla. Ankaŭ vi!

Ni funebras

Forpasis Raul Juárez Sedeño (1926-2012)

La dojeno de la Esperanto-movado en Kubo, Raúl Juárez Sedeño, forpasis la 4-an de junio en sia hejmurbo Camagüey, kie li naskiĝis la 2-an de oktobro 1926. Lia patro estis delegito de UEA en Camagüey, sed li mem lernis Esperanton nur post lia morto, helpe de libroj en la hejma biblioteko. En la kvindekaj jaroj li komencis aktivi movade, instruante regule ekde 1957, kiam li ankaŭ membriĝis en UEA. De 1958 ĝis 1963 li estis delegito kaj, kiel profesia kontisto, landa kotizperanto de UEA. En 1987 li denove fariĝis delegito kaj krome fakdelegito pri la historio de Kubo. Post la Kuba revolucio Juárez Sedeño estis longe preskaŭ la sola Kuba esperantisto, kies nomo estis internacie konata. Interalie, li korespondis kun alilandanoj, esperantigis kubajn poemojn kaj novelojn, peris la revuon "Paco" kaj daŭrigis instrui Esperanton. Li faris ankaŭ multe da esploroj pri la historio de Esperanto en Kubo. Lia fidela agado ludis rolon en la revivigo de la kuba movado en 1971. Li estis honora membro de Kuba Esperanto-Asocio kaj, elektita en la 75-a UK en Havano en 1990, ankaŭ de UEA. (Érk:2012.VI.21 Gazetaraj Komunikoj de UEA, N-ro 459)

Forpasis sinjoro Attila Makai



En Abaújszántó oktobre de 2008. ĉe la Kalocsay-memortabulo parolas sinjoro Attila Makkay veninta el Oradea, nome de la rumaniaj geesperantistoj (en hela jako).

La 14-an de aŭgusto en 2012 alvenis la ŝokiĝinta famo, dume mi vokis telefone nian malnovan klubosekretarion, ke forpasis sinjoro **Stefano Pál**.



(La bildo pretiĝis okaze de Zamenhof-tago la 15-an de decembro en 2006. Stefano Pál videblas apud la okulvitraj virinoj antaŭ la ĉapon portanta sinjoro. Fotis tiun László Pásztor, disĉiplo de Stefano Pál.)

Lia edzino s-rino Stefano Pál hodiaŭ (14.aŭg, 2012) post la 12-a horo 30 minutoj komunikis dum mia telefonvoko, ke ŝian edzon ĝuste antaŭ mia telefonvoko oni forportis, nome li mortis en sia 86. jaraĝo. Ŝi tion diris, ke li havis pulmiton kaj ne tute saniĝis, sed inter aliaj kaŭzo de la morto estis la kormalsano.

Li kiel fervojisto ofte vizitis la miskolcan Esperanto-fakrondon, kiu tiutempe funkciis en klubo de strato Kossuth tempe de Ludoviko Király, prezidanto de la Esperanto-klubo. Li partoprenis multe da Esperanto-renkontiĝoj, dum kiuj evoluigis lian Esperanto lingvoscion. Li kaj Stefano Temesi redaktis la „Verda vojo” titolan mimeografitan esperantan lingvan miskolcan fervojistan eldonaĵon, kiu estis laŭ nia scio revuo de geesperantistoj de Veturilripariga Uzino (Tiszavas/Tisa-fervojo) de Miskolc. Li estis membro de Esperanto-Fakrondo de „Rónai Sándor” Departementa Kulturdomo de Miskolc, an kiu fakrondo li faris sekretariajn taskojn. Li faris same sekretariajn taskojn ĉe la BAZ-departementa Esperanto-Komitato ĝis 1980 apud D-ro Ludoviko Györy Nagy, prezidanto kaj poste ĝis 1992 apud Barnabo Batta, prezidanto. Li estis bonega helpanto kadre de la organizadoj de la kultúra vivo, movada vivo kaj la Esperanto lingvokursoj, kiujn faris en la Kossuth-strata, la

Mindszent-strata kulturdomoj, en Kulturdomo „Ady, Endre” kaj en diversaj vilaĝoj de BAZ-departemento.

Pri famaĵoj de Miskolc kaj BAZ-departemento li prezentis diapozitivojn, ambaŭ dulingve diris klarigajn prelegojn kaj meritis inde rekonon de la hungaraj kaj eksterlandaj gasroj. Li eldonis hungarlingve lian Esperanto-movadhistorian verkon, kiun esperantigis László Pásztor, la tiama junulara sekretario de Esperanto-Fakrondo de „Rónai Sándor” Departementa Kulturdomo. La retrevuo Nordhungaria Informo aperigis tiun verkon kaj hungare kaj Esperantlingve. Numerojn de tiu ĉi revuo la Esperanto-Muzeo de Vieno gardas. Li verkis la „Historion de Fervojo de Miskolc, sed nur hungarlingve, kiu ne havas esperantan lingvan tradukaĵon, laŭ nia scio.

Li ĉiam entuziasme partoprenis la rememorigajn festojn de la Zamenhof-tago, kaj aliajn aranĝaĵojn, kiujn la „Király Lajos” Esperanto-Amika Rondo aŭ la geedzoj Pásztor organizis.

Krome li havis hungarigojn el la Esperanto- literaturo kaj hungarlingvajn versojn. En eldonaĵo „In memoriam Kalocsay” de Ada Csíszár estas lia hungarigo de verso „Kisoj” de D-ro Kolomano Kalocsay, kiu estas tre ege elstara hungarigo. Li hungarigis la „Espero” titolan verson de Zamenhof. (La Esperanto-himnon.) Tiun la hungarigon ni aperigis en la jam menciita interreta revuo, en la Nordhungaria Informo.

Ni tre ege bedaŭras, ke li ne volis paroli por nia interreta revuo pri lia vivo kaj ceteraj verkoj.

Li havis du geedzinojn, el ili du edzinojn, du filinojn, nepojn. Li estis kara, ŝercema, inteligenta, kulturita homo. Li faris multege por disvastigo de Esperanto, lingvo internacia en Miskolc kaj BAZ-departemento.

Estu benata lia memoro por ĉiam!

Nome de geesperantistoj - kiuj konis estimis lin – (**Probal Dasgupta** /prezidanto de UEA el Hindujo/, **Osmo Buller** / de CO de UEA el Nederlando/, **Milan Neubeller** /el Poprad-Slovakio/. **Magdalena Feifičová** el Žilina-Slovakio/, **Elda Doerfler** /el Triesto-Italio/, **Sylvia Hämäläinen** /el Tampere-Finnlando/ s-ino **Anna Bartek** nome de la Hungaria Esperanto-Asocio el Budapeŝto, krome **d-ro Imre Ferenczy** el urbo Győr, el la setlejoj Vácrátót, Miskolc, Ózd, Szirmabesenyő, Tokaj, Eger, Nyíregyháza, Kelebia.

S-ino Adrienne Pásztor

Kiun donis al vi ĉiela destino,
Varme venu de vi estima manpremo,
Kaj se via sonĝo fariĝos reala,
Ne forgesu restu

Ĝis la mort' fidela!

(De Imre Madách la verson esperantigis István Pál)

Mi petas, bonvolu legi la funebran parolon de doktoro Jozefo Halász, dum la entombiga ceremonio de Pál, István la 22am de aŭgusto 2012a:

„Pál, István”



La 14-an de aŭgusto 2012, en sia 86-jara aĝo mortis Pál István. El inter ni forpasis eminenta fervojisto, estimata kolego, elstara figuro de la fervojista Esperanto-movado.

En niaj memoroj li aperas, kiel gvidanto de la plansekcio de Vagonripara Uzino en Miskolc. Li faris sian responsplenan laboron en ĉirkaŭbarita organiza unuo, en la Vagonripara Uzino, kiu estis grava parto de la tiutempe unueca hungara fervojo.

Krom sia faka laboro ĉiam li trovis tempon kaj eblecon por sia multkolora agado kiun li faris por la kolektivo.

En 1975 aperis lia verko, vekanta sensacion, kies titolo estas: „Sur la transa flanko de la relvojo”, [A vaspálya túlsó oldalán] en kiu li verkis la historion de sia laborejo. (recenzio de la libro aperis en numero 1976/2 de HFM) Ĉi tiu libro atestas tiun ĝisfundan labormetodon kiu karakterizis la aŭtoron. Li pasigis longan tempon en la arkivejo, kaj faris precizan esplorkon. Ĉiun sian aserton li pruvigis per dokumentoj. Lia verko enhavas 270 dokumentojn kaj fotojn.

Liajn sinsekvajn verkojn karakterizas sama precizeco kaj sentroigo ni povas diri, li estis kronikisto de la fervojista vivo de urbo Miskolc. Lia krea agado pleniĝis en la dua duono de la 80-aj jaroj. Lia libro titolita „Fevojo ĉe la ekstremo de la urbo” [Vasút a város végén] aperis en 1984, okaze de la 125 jara datreveno de inaŭguro de fervojlinio inter Debrecen kaj Miskolc. La sekva libro aperinta en 1985 prezentas la centjaran historion de la vira ĥoro de Vagonripara Uzino en Miskolc, ĝia titolo estis „Kie kanto fontas apud la laboro” [Ahol a munka mellett dal fakad]. Okaze de la 75 jara datreveno de la fervoja sporto estis pretigita lia verko kies titolo estis „Pri kio rakontas la kavo” [Amiről a kubik mesél] La historion de Esperanto-vivo en nia urbo inter 1913 -1988 li eternigis en sia verko titolita „Elektajo el vivo de la Miŝkolca Esperanto-movado” [Szemelvények a miskolci eszperantó mozgalom életéből]

Li estis aktiva esperantisto inter 1957 kaj 1992. Tiam li aliĝis al nia movado, kiam finiĝis la periodo de la silento, trudita al nia movado komence de 50-aj jaroj. Li agadis en la Esperanto-grupo „Verda Vojo” troviĝanta en la Vagonripara Uzino. Li ne nur uzis, ankaŭ instruis nian lingvon. El lia 15 parta kursomaterialo multaj lernis, eĉ kelkaj instruis la lingvon dum multaj jaroj. Siatempe liaj taskofolioj estis novtipaj, ne kutimaj kaj eĉ nun oni povas rigardi ilin modernaj. Ili estas amuzaj kaj troviĝas en ili humuro. La lernantoj de la kursoj ŝatis, kaj rezulthave uzis ilin. La instrumaterialo spegulis ke sia pretiganto havis altnivelan lingvoscion.

Tion, ke li havis emon al la literaturo kaj poezio atestas liaj kelkaj aperintaj verkoj kaj arttradukaĵoj. El ili ni mencias lian poemon, titolitan „Al mia pli juna fratino” [Húgomnak] kaj esperantlingvan novelon, aperintan en Hungara Fevojista Mondo en 1986. Ĝia titolo estas „La deknaŭa”. El liaj arttradukaĵoj aperis la hungarlingva traduko de la Esperanto-himno.

Pro siaj deca maniero, helpemo, kaj bona organiza kapablo baldaŭ li iĝis gvidanto de la movada laboro. Komence li estis estrarano, poste prezidanto de la Esperanto-grupo „Verda Vojo”. Plej ofte li reprezentis sian grupon en la jarkunsidoj de la hungaraj fervojistaj esperantistoj. Per siaj alparoloj proponoj li helpis la fakan laboron, kaj disvastigon de nia lingvo.

Li estis la sekretario de la Teritoria Komitato de HEA en departemento Borsod-Abaúj-Zemplén. Li helpis kaj gvidis la agadon de la Esperanto-grupoj troviĝantaj en la departemento, organizis lingvokursojn kaj ekzamenojn.

Liaj prelegoj, la jarfinaj kaj karnavalaj aranĝaĵoj organizitaj de li estis gajaj, amuzaj sukcesaj, kaj ili havis favoran resonon en la gazetrao.

Kiel sekretario de la Teritoria Komitato li estis unu el la subskribantoj de la ĝemelurba kontrakto inter esperantistoj de Miŝkolco kaj Amsterdamo en 1969.

Li priantis la sorton de tiuj publikaj terenoj kiuj portis nomon ligiĝantaj al Esperanto. Kiam en 1999 oni ŝanĝis la nomon de placo Esperanto en urbo Miskolc, laŭ lia iniciato ricevis la nomon parko Esperanto tiu parko kiu situas apud la placo.

Li estis motoro de la Esperanto-movado.

Karakterizas lian modestecon, ke li rifuzis la interparolon pri siaj vivo kaj movada agado.

Li laŭiris tre sukcesan vivovojon kaj valoran heredaĵon lasis por ni, ni ŝuldas dankon al li.

Liajn verkojn, fotojn konservas la flaviĝantaj folioj de libroj kaj revuoj, lian personecon, la eventojn de la kune pasigitaj tempoj ni stokos en nia memoro.

Antaŭ lia lasta vojo ni adiaŭas la iaman fervojiston, erudiciulon. Je la nomo de fervojistaj esperantistoj, kaj esperantistoj vivantaj en urbo Miskolc kaj en departemeneto Borsod-Abaúj_Zemplén ni adiaŭas la elstaran figuron de la Esperanto-movado.

Kara Piŝta!

Via forpaso tre doloras nin. Ni konservas vian memoron. Ripozu en paco!”

Leterkesto

Per Esperanto vojaĝoj tra Azio somere de 2012

Lige kun 97-a Universala Kongreso de Esperanto en Hanoi – Vjetnamio kaj 22-a Internacia Kongreso en Hainan Insulo – Ĉinio, Internacia Klubo “Esperantotur” en Bydgoszcz – Pollando aranĝis vojaĝojn laŭ kelkaj variantoj dum 22.07-12.08.2012 tra Ĉinio – Vjetnamio – Hainan Insulo ĝis Hongkongo.

La unuan etapon dum 22-27.07.2012 partoprenis ne nur pola-afrika grupo de Esperantotur, sed ankaŭ internacia Esperanto-karavano el Moskvo tra Siberio – Mongolio – Ĉinio ĝis Vjetnamio kaj grupoj de mongolaj kaj ĉinaj esperantistoj. Post komuna vizitado de Beijing (Pekino) ni trajnvojaĝis pli ol 2500 km tra Wuhan ĝis Nanning kaj de tie buse al ĉina-vjetnamia landlimo. En la internacia buso estis prezentita i.a. nova filmo de red. Roman Dobrzynski en Esperanto “Tagoj de Bydgoszcz 2012”, kiu prezentas ankaŭ agadon de Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo - Klerigejo de AIS en Bydgoszcz. La ĉinan-vjetnamian landlimon necesis trapasi piede por eniri poste vjetnamiajn busetojn, kiuj veturigis nin al Hanojo. Pozitive ŝokis nin tre afabla landlima kontrolo de vjetnamianoj, kiuj rapide nur ŝtampis pasportojn, eĉ ne kontrolante vizaĝojn de niaj grupanoj.

La dua etapo okazis jam en Hanojo – la ĉefurbo de Vjetnamio dum 97 UK 28.07-4.08.2012. Detalajn raportojn pri la sukcesa 97 UK Vi certe jam legis – mi nur aldonu, ke laŭ mia opinio (mi partoprenis ĝis nun 41 UK-ojn de Esperanto), la 97 UK apartenis al la plej sukcesaj Universalaj Esperanto-Kongresoj. Kvankam, ke ĝin partoprenis malpli ol 1000 kongresanoj, Esperanto-etoso estis tre bona, ni kongresis ĉefe en luksa hotelo MELIA, la plej ofte en almenaŭ 4 salonoj samtempe. Sola malavantaĝo estis perdo de tempo por busa transportado al ĉefa Zamenhof-Salono en Politekniko de Hanojo. Tamen elstaris bonega kaj riĉega akcepto de preskaŭ 200 kongresanoj ĉe la Urbestro de Hanojo kaj la plej vasta flago-informado en Hanojo – kie estis pendigitaj certe pli ol mil Esperanto kaj vjetnamiaj paneloj pri la 97 UK, do, pli ol nombro de kongresanoj, ĉar multaj rezignis veni pro altaj flugkostoj. Tial Esperantotur-grupo flugis al Pekino kaj reflugis el Hongkongo, ĉar tiel ni ŝparis pli ol 500 USD po persone, kio sufiĉis preskaŭ por senpaga vojaĝo tra Ĉinio. Dum semajno de la 97 UK ni faris kelkajn ekskursojn – ĉefe en fama Ha Long-Golfo, kie ni ŝipekskursis, bone manĝis kaj vizitis ankaŭ novan luksan ripozcentron Tuan Chan. En Hanojo ni vizitis Malnovan Urbon de 36 stratoj kun fama Templo de Redonita Glavo, Muzeojn de Literaturo kaj Etnologio de 54 nacioj, Maŭzoleon kaj Muzeon de Ho Chi Minch kaj 4 belajn templojn de Hanojo. La turisman programon kompletigis unika pupteatra spektaklo en Thang Long Hanoi. Post la fermo de la 97 UK ni revenvojaĝis la 4.08.2012 samvoje al Nanning en Ĉinio, de kie Esperantotur-grupo veturis por 22-a Internacia Esperanto-Kongreso en Hainan Insulo en Ĉinio kaj ĉina, mongola kaj nepala grupoj norden – hejmen. Entute niajn vojaĝojn partoprenis pli ol 50 esperantistoj el 4 kontinentoj – Azio, Afriko, Norda kaj Suda Ameriko kaj Eŭropo. Dum la 22-a Internacia Esperanto-Kongreso ni vojaĝis de Nanning buse al Beihai, de tie prame al Haikou – ĉefurbo de Hainan-provinco, buse tra la Insulo Hainan al Sanya – la plej fama pli ol duonmiliono ripozloko de “Ĉinaj Havajoj”, kie hotelprezoj vintre estas kelkfoje pli altaj ol somere kaj kie eblas aĉeti la samajn ĉinajn vestaĵojn kiel ĉemizoj en Honolulu (Havajoj), eĉ kun similaj prezoj. Tie ni vizitis faman Parkon ĉe ĉina fino de la mondo – Tianga Hayiao, la plej longan - 7 kilometran, belegan plaĝon Yalong Wan kaj alian en Dadonghai-kvartalo, kie regas, krom ĉina, ĉefe rusa lingvo, ĉar malpli kostas flugi el Siberio al Sanya, ol ekz. al rusa Soĉi. Post ripozo en Sanya ni daŭrigis per litvagonaro al Guangzhou (Kantono), de kie buse al Hongkongo, kaj fine, ni reflugis tra Moskvo al Varsovio.

La tutan Esperantotur-vojaĝon en Ĉinio kaj Vjetnamio prizorgis kaj bone gvidis en Esperanto S-ro Jianguo Liu – estro de Ĉina Esperanto-Instituto en Hefei, samtempe Vicprezidanto de nia Internacia Klubo Esperantotur, al kiu ni tre kore dankas.

Se Vi volas labori kiel Esperanto-vojaĝgvidanto, aliĝu por studoj 2012/2013 en Internacia Studumo pri Turismo kaj Kulturo - Klerigejo de AIS (Akademio Internacia de la Sciencoj) en Bydgoszcz, Pollando, kaj, se Vi volas vojaĝi kun Esperantotur en 2012 kaj 2013 – pluraj Esperanto-vojaĝoj atendas Vin – kontaktu nin!

Kore salutas Andrzej Grzębowski

Prezidanto de Internacia Klubo Esperantotur en Bydgoszcz, Pollando, rete: info@esperanto.bydgoszcz.eu

Bona Espero, infana hejmo: Brazilio

Kara Adri,

la infana hejmo Bona Espero bezonas novajn homojn, novajn amikojn -- Esperantistoj ĝenerale nur ludas kun Esperanto -- mi pagas specialan retejon kaj povas publikigi tradukojn en multaj lingvoj. Dankon por via prezentaĵo de kavernoj en Azio. Belaj fotoj. Jes, mi scias, ke vi havas la libron Bona Espero, idealo....

Mi estas en Prago, kaj preparas min por denove veturi al Brazilo. La infana hejmo bezonas novajn homojn, novajn volontulojn, novajn amikojn. Tial mi tradukis la libron al mia lingvo, kaj tial mi instigas esperantistojn, por ke ili serĉu vojojn kaj rimedojn por traduki la libron al aliaj naciaj lingvoj. (Mi pagas specialan retejon kaj povas publikigi tradukojn en multaj lingvoj-) Notu bone, ke ne necesas, ke amikoj kaj volontuloj de Bona Espero estu nur esperantistoj. Tiuj estas ankaŭ multaj neesperantistoj. Necesas nur ebligi, ke ne esperantistoj eksci pri tiu infana vilaĝeto en Brazilo. Ĉu vi jam rimarkis, ke esperantistoj ĝenerale okupiĝas nur pri si mem? Kaj ke ili ne emas helpi per sia lingvo al iu ajn, krom al ĝis-ostaj esperantistoj? Tion tute certe ne akceptus doktoro Zamenhof. Akceptota (la falsa ideo pri la fina venko) Esperanto ne devus esti ja la celo de la tut-viva strebado de esperantistoj, sed helpi per Esperanto al aliaj homoj. Tio estas la origina celo de Zamenhof. Esperantistoj ĝenerale nur ludas kun Esperanto, anstataŭ montri per helpaj agoj la utilecon de la internacia lingvo. Ne forgesu, ke Zamenhof estis kredanta homo, kaj liaj originaj intencoj, tiom forgesataj de nunaj esperantistoj, certe plaĉas al Jesuo Kristo (servo al niaj proksimuloj).

En Kristo: Jan Josef Pospíšil, amiko de la infana hejmo Bona Espero

Jan Josef Pospíšil <ingjanpospisil@gmail.com>

<http://knihabonaespero.cz/eo/19libroBonaEspero.htm>

Esperanto Bona Volo

Kun ĝojo ni invitas Vin viziti LBV-retejon por legi raporton kaj vidi foto-galerion pri ĉi tiu grava evento de Legio de Bona Volo (LBV), kiu okazis ne la urbo San-Paŭlo, Brazilo, pasintsemajne kaj temis pri "Taksado: ia rigardo trans la intelekto".

<http://www.boavontade.com/inc/interno.php?cm=95046&cs=14&ci=6>

http://www.boavontade.com/fotos/index2.php?option=com_galeriasmc&view=exibirgaleria&id=145&idioma=6

Ankau' mi ŝatus, ke Vi bv. spektu du filmetojn (unu el li kun esperanta voĉo, kaj la alia kun esperanta subteksto). Ili pritraktas viziton de E-edukistino el Koreio al Centro pri Edukado de LBV en la urbo Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo, kaj la alia pri lecionoj de Esperanto en la sama LBV-Edukejo. Jen la ligiloj:

<http://www.boavontade.com/inc/interno.php?cm=93732&cs=14&ci=6>

<http://www.youtube.com/watch?v=9BYOcF42zWs>

Bonvole komenti ĉi tiun okazaĵojn de Legio de Bona Volo. Ni multe ŝatus koni vian opinion pri ili! Lau' via ebleco bv. disvastigi la novaĵojn...

Plej bondezire pri granda sukceso al via laboro,

Vin korsalutas: Maria Aparecida da Silva, Respondeculino de la Departemento pri Esperanto de LBV
www.bonavolo.com, www.tbv.com.br/esperanto

AIS en San-Marino

SUS 33, la 33-a Sanmarineca Universitata Sesio de AIS San-Marino, okazos inter la 3-a kaj la 7-a de septembro 2012 en la pola ĉefurbo Varsovio (Warszawa)

Pliaj sciigoj ĉe <http://www.ais-sanmarino.org/>

pri la programo vidu

<http://www.ais-sanmarino.org/arangxoj/sus/sus33/programo.pdf>

Eŭropa Tago de Lingvoj http://eo.wikipedia.org/wiki/E%C5%ADropa_Tago_de_Lingvoj

Reta Universitato

Bonvenon al la retejo por la Universitato de Esperanto. Ĉi tie vi trovos la filmojn de la lecionoj jam instruitaj dum la sesioj de la Universitato de Esperanto. La unuaj universitataj kursoj okazis en januaro kaj februaro 2012. **Se vi estas profesoro**, kaj jam instruis vian kurson nacilingve en la kadro de akreditita universitato, vi povas ankaŭ instrui ĝin en Esperanto. Ĉiuj lecionoj de la Universitato de Esperanto estas filmitaj, kaj poste metitaj sur la interreto, senpage, sub la licenco de Krea Komunumaĵo. Kontakti nin por pli da detaloj :

<keefeinchina@gmail.com> **Se vi estas studento**, vi povas ĝui kaj studi kompletajn kursojn pri diversaj temoj en la internacia lingvo Esperanto. Nun estas du temoj: unu kurso kiu pritraktas militon kaj alia nomata Historio kaj Filozofio de la Informadiko. www.universitato.info /Informis Germain Pirlot

Internacia simpoziono en Bulgario

“Estimata Adri Pa'sztor

Mi tre bedaŭras, ke Vi ne partoprenis la Simpozion AEPA-2012, sed mi esperas, ke sekvontjare Vi estos inter ni!

Certe Vi jam estas informita pri la Simpozio, sed aldone mi sendas al Vi la oficialan informilon pri AEPA-2012. Mi pardonpetas, ke tiel malfrue sendas al Vi la informilon, sed

tuj post la Simpozio mi estis tre okupita kunlige kun miaj funkcioj kiel BEA Prezidanto kaj ankaŭ kun la novaj funkcioj kunligitaj kun mia elekto en la Gvidorganojn de la neesperantista Faka Asocio- Federacio de Scinc –teknikaj Asocioj en Bulgario/FSTA/

Kun ĝojo mi deziras sciigi Vin pri la grava agnosko de mia longjara scienc-eduka agado en Bulgario.

Je la 28-a de junio en Sofio okazis la Generala Asembleo de la Federacio de la scienc- teknikaj Asocioj en Bulgario/FSTA/ Ĝi estas la baza scienc-eduka kaj teknika organizo en nia lando. Ĝiaj membroj estas 20 fakaj sciencaj kaj profesiaj Scienc-teknikaj Asocioj /STA/, kiel ekzemple Scienc-teknikaj asocioj pri maŝinkonstruado, metalurgio, kemio, energetiko, ekonomiko, transporto, geologio k.a fakaj sciencaj kaj profesiaj fakoj.

La delegitoj de la Asembleo unuanime elektis min kiel MEMBRO de la ESTRAR-KONSILANTARO de la FEDERACIO /EK de FSTA/, surbaze de mia pli ol 40 jarojn aktiva agado en STA pri maŝinkonstruado en nia regiono kaj lando/ Mi estas fondinto de la Domo de tekniko en Karlovo kaj Gvidanto de Internacia Centro por scienc-teknika informado kaj patentaj esploroj/ La Estrara konsilantaro de FSTA estas la plej supera kaj grava gvidorgano de FSTA. Membroj de EK de FSTA estas eminentaj bulgaraj scienculoj, profesoroj kaj fakuloj en diversaj fakoj kaj ilia unuanima decido elekti min kiel Membro de EK de FSTA estas fido al mi, agnosko de mia longjara scienc-eduka agado, ne nur kiel esperantisto, sed ankaŭ kiel profesia fakulo !

Kun plej koraj salutoj restas amike Via Bojidar Leonov



Inaŭguro de AEPA-2012. Karlovo

INTERNACIA SIMPOZIO “APLIKO DE ESPERANTO EN LA PROFESIA AGADO “/AEPA-2012//Karlovo-Sopot 15-22.06.2012”

La 9-a Kongreso de EEU okazis en Galivo, Irlando

<http://www.europo.eu/documentloader.php?id=348&filename=eb-118-07-08> 2012.pdf

Somera Esperanto-Studado (SES)

En la slovaka urbo Nitra, inter la 21a kaj la 29a de julio, okazis la 5a Somera Esperanto-Studado (SES) organizita de Edukado@Interreto (E@I, la organizo kiu ankaŭ respondecas pri la retpaĝaro lernu.net). En bonega etoso kaj sufiĉe varma vetero, 250 partoprenantoj el 23 landoj grupiĝis en 10 klasĉambrojn laŭ 6 niveloj (A1, A2, B1, B2, C1, C2). Oni povas vidi plurajn fotojn pri la etoso en SES

<https://plus.google.com/photos/102475826370689061272/albums/5771730332756440529?banner=pwa> (Inf:GP)

LIRO 2012

Estimataj:

Revenis la Literatura Konkurso LIRO. Alklaku sube kaj konu la detalojn:

<http://www.ipernity.com/blog/31313/400395>

Informis: Aloísio Sartorato, Rio, Brazilo

Indiana Kooperativa Grupo adoptas Esperanton kiel laborlingvon

Legeblas ĉe <http://www.liberafolio.org/Members/cneidorf23/indiana-kooperativa-grupo-adoptas-esperanton-kiel-laborlingvon>

La Indiana Kooperativa Grupo, transnacia organizaĵo en kunlaboraj rilatoj kun Intraespo kaj lanchintoj de Kiberio, decidis adopti Esperanton kiel laborlingvon. (Sendinto: Germain Pirlot)

125. jara festo en la Demokratia Kongo



La fotojn sendis fraŭlino Nelly Masemi Mbi

80 jaras la verkisto Sen Rodin

Al la sendita gratula letero mi ricevis la malsupran respondon de li:

„Kara Adrienne,

jes, mi ne konas vin persone, tamen mi kvazaŭ konas, ĉar ofte mia Formiketo (Julia) parolis al mi pri vi kaj pri via konstanta aktivado por nia kulturo. Mi multe dankas pro viaj belaj bondeziroj kaj gratuloj, kaj pro la donaco: la Kata Ludo estas tre bela, interesa, amuza. Komence mi ne kapablis malpermesi, ke la bela katido fuĝu, sed poste mi ekrimarkis, ke ĝia baza ludsistemo similas al bela dana ludo, nomata "HEX", inventita far studentoj de matematiko en la Universitato de Kopenhago en la 50-aj jaroj. La ludo okazas sur ludtabulo el heksagonoj (sesanguloj), pro tio la nomo. Kaj ankaŭ la katludo fakte situas sur heksagonoj, ankaŭ se ili ne vidiĝas. Por malpermesi, ke la katido fuĝu oni devas prepari barilon de sufiĉe malproksime, laŭ certaj reguloj. (Se oni volas bloki ĝin de proksime, ĝi certe fuĝas). Mi ne scias, kiu inventis tiun ĉi variaĵon de "HEX", sed sendube ĝi estas tre ingenia kaj amuza... <http://www.gamedesign.jp/flash/chatnoir/chatnoir.swf>

Kun plej sincera amika brakumo, Sen Rodin

P.S. - Mi dezirus legi vian rakonton, kiu ricevis honor-mencion en la Belartaj Konkursoj. „

Esperantro-sukcesoj ĉe TATOEBA [/http://edukado.net/novajhoj?id=271](http://edukado.net/novajhoj?id=271)

AŬTUNE - Komuna feriado por infanoj, familioj, geavoj: de sabato, 27-a de oktobro ĝis sabato, 3-a de novembro 2012-a: www.gresillon.org/autune Kontakto: kastelo@gresilloon.org La simbolo de la aranĝo estas skarabo sur falinta folio:

<http://gresillon.org/local/cache-vignettes/L140xH140/rubon36-b5c6e.png?1345917169>

Fotoj de la kastelo troviĝis en tiu paĝo gresillon.org/fotoj; elektu laŭvole.

Doktorino Anna Orsós

La Beaŝ-aj lingvoj

Esperantigis: Adrienne Pásztor

-Daŭrigo-

Parto III-a

3.1.1. La 2003. jara ŝanĝoj de la publiko-kleriga leĝo

La modifo de la leĝo 1993. jara LXXIX.(79-a) pri la publiko-klerigo grave ŝanĝiĝis dum la pasintaj kelkaj jaroj en intereso de plibonigo de la ĝenerala instrua situacio de la ciganaj infanoj.

La transformo de la cigan-samniveliga-, poste la cigan-minoritata instruado kreis la fakajn kadrojn, sed grava enhava demando estas, ke laŭ la cigan-minoritata instruado koncerna la horo-nombroj de la cigan-lingvaj instruoj malpliigiĝis al du ĉiusemajnaj, tiel plifaciliĝis la kuntirado (blokigo) dum la jaro, kaj kun gastoinstruado en kadroj de tendaro aŭ alia aranĝaĵo estas organizebla la lingvoinstruado.

Tiu ĉi dispono, kvankam gravas ĝi el instru-politika vidpunkto, el lingvopolitika vidpunkto nenomebla estas al boninflua, ja per tiu la kondiĉoj de la lingvoinstruado ne ekkreiĝas. Kaze de la ciganaj lingvoj okazis unu permes-tipa edikto-modifo, kiu ne levas la imponecon de la ciganaj lingvoj kompare al la pliaj minoritataj lingvoj.

Baze de la publiko-kleriga leĝo, kondiĉoj de dungo en la pedagoga agado sfero simile diskriminacias la dungajn kondiĉojn de la instruistoj instruantaj la patrujan minoritatan lingvon kaj la instruistoj de fremda lingvo. Laŭ tiuj:

„ Al instruado de fremda lingvo - en ĉiu lernejo tipo – dungeblas, kiu disponas per universitata diplomo lingvoinstruista aŭ fremdlingvo- kaj literaturo faka fak-edukiteco. Kaze de la lingvoj naciecaj, etnaj minoritataj ĝis la 1-a de Septembro 2006. por instrui naciecan, minoritatan lingvon estis dungigebla pedagogo dispona per pedagoga diplomo kaj almenaŭ mezgrada „C” ŝtata lingvoekzamena atestilo aŭ per ĝi samvalora dokumento, plue dungeblas pedagogo al instruado de la lingvoj Bulgara, la Ciganaj (Romani kaj Beaŝa), Greka, Pola, Armena, Rusena, Rutena, sen komenco de la supergradaj studoj senbare dungeblas tiu, kiu havas - el la konkreta lingvo - supergradan „Co” tipan ŝtatan lingvoekzamenan atestilon aŭ per tio samvaloran dokumenton.”

Tiu ĉi dunga kondiĉo kreas eblecon por la lerneja enkonduko de instruado de minoritata lingvo, sed el faka vidpunkto estas al fiasko kondamnita entrepreno jam dekomence por la nure per lingvan kompetenton havanta individuo – sen manko de faka edukiteco – por „praktiki metion”. La prilaboro de kondiĉoj pri edukado al lingvoinstruado estiĝis ĉiam pli urĝa tasko. Sed ne nur ties manko malhelpas la vasta-rondan, postuleman ciganlingvan instruadon, pli ĝuste la patrinlingvan instruadon. Nekonsiderante kelkajn kondiĉojn, ankaŭ plue ne estas disponeblaj la objektaĵaj kondiĉoj: mankas la tiuj lernolibroj, instruaj helpmaterialoj, kiuj estas havendaj al provizoj de tiuj programoj.

Krom la mankoj de kondiĉoj personaj kaj objektaĵaj, ankaŭ la aktuala stato de la lingvo/lingvoj, dialektoj, la reteno de la faka laboro, la tempoperdigo malfaciligas la eblecon de lerneja instruado. La realigo de la ciganlingva instruado kaj ĉefe la patrinlingva instruado ja estas procezo bezonanta pli longan tempon, sed de jaroj grava antaŭenpaŝo jam ne okazis en tiu afero. Kiel ankaŭ miaj empirismaj datumoj argumentas, la lingvoperdo, la lingva asimilado daŭriĝas, kaj en la estonto estiĝos ĝi ne returnebla, tial la laborkomenco ne toleras jam prokraston.

3.2. La konstato, priskribo de la cirkonstancaro kaj taksado de la nuntempa instruado de la lingvo Beaŝ

Instruado de la lingvo Beaŝ, unua foje komenciĝis en la Gimnazio Gandhi kiu iris en 1994. fondita ŝtate. Ĝis tiam nek en la bazgradaj lernejoj nek en la duagradaj lernejoj okazis instruado de lingvo Beaŝa, eĉ kaŭzis zorgojn ankaŭ la diferencigo de la lingvoj Beaŝ kaj Romani. Ankaŭ hodiaŭ multaj pedagogoj rigardas la du lingvojn; dialektoj unu de la alia, sed kiel lingvoj Hind-eŭropaj; la lingvoj Beaŝ apartenas al la Latinlingvoj, Romani apartenas al grupo de Hind-lingvoj. La institucioj edukaj, instruaj povas pretendi apartan normohavon per konsidero de la edikto 58/2002. OM. kaj la supre menciitaj reguladoj al instruado de la konoj pri la Cigano-popolo kaj al iu ajn Cigano-lingvo.

El inter la estintaj bazaj institucioj de la Landa Instrua Integriĝa Reto en ses institucioj, kaj en pliaj kvar tiuj institucioj – kiuj ne apartenis inter la bazinstituciojn de LIIR en la 2005/06-a studjaro oni daŭrigis instruadojn de la lingvo Beaŝ. El inter la denombritaj mankoj eble estas la plej baza, ke la faka ministerio respondecas pri la publika instruado ankoraŭ nun ne disponas per datumoj pri la kie-aj okazoj de instruado de la lingvoj Cigana respektive Beaŝa, kia nombra studentaro partoprenas ilin, per kiuj lingvaj kaj pedagogaj kompetentoj (fak-scio, kompetenteco, kapablo) disponantaj instruistoj instruas. Pri la registara programo kaj la dispozicioj per tio interrilataj parolataj en sia 62a punkto de 1 numera aneksaĵo de decido Ministrara 1021/2004 (18.03.) - akcelada al socia integriĝo de la Ciganoj Hungariaj – pro la esprimita eblo de la plivastigo de la hungaraj entreprenadoj metita en la Eŭropa Manifesto de la Lingvo Regiona aŭ Minoritata, la Nacia kaj Malplimultula Oficejo opiniis ke necesas por studi: ĉu estas disvastigebla la defendo al la lingvoj Ciganaj – inter ili al la Beaŝ - parolataj en nia patrujo, tiel ankaŭ, kiaj disponoj fako-tipaj necesas ankoraŭ al la disvastigado. Al ekzameno de situacio de la lingvo Beaŝa en la enlanda publika- kaj supera instruado, tiel ankaŭ al trarigardo de ebloj evoluigaj de la lingvoinstruado oni invitis min. Tiel estiĝis ebla por mi la malkovro de institucioj instruadaj koncerne la Beaŝ-lingvon, en la lernejoj daŭrigi enketilan konstaton rilate cirkonstancojn de la lingvoinstruado. Ĝis la fino demandante ĉiun lernejon de la por mi disponita adreslisto, tiel ankaŭ ĉiun de la institucioj bazlokaj; mi konstatis ke en Hungarujo entute en du mezgradaj lernejoj donantaj ankaŭ diplomojn pri plenumo de ekzameno pri studa matureco kaj en pliaj ok lernejoj

elementaj oni instruas la Beaŝ-lingvon. En tiuj ĉi institucioj kiel studobjekto rolas la Beaŝ-lingvo - sendepende de la deveno de studentoj - por tiuj, kiuj ŝatus lerni ĝin. Al tio bezonatas gepatra skriba konsento. Tiuj ĉi lingvaj horoj povas okazi en tempozono metita en la horaron aŭ en blokigita formo konvene al kadro de ĉiusemajnaj du horoj aŭ je komenco aŭ je fino de la studjaro. Dum la studjaro 2005/2006-a en Hungario oni instruis Beaŝ-lingvon en dek publikaj instruejoj.

3.3.La lingvo Beaŝ en la supera instruado

Ekde aŭtuno de 1994, la ankoraŭ tiama Altlernejo Eduka Instruistojn „Csokonai Vitéz Mihály” [Mikelo Ĉokonai Vite’z] de urbo Kaposvár organizis: du jaran instruadon pri fako Romologio post la akirita unua diplomo, en kies kadro oni instruis ambaŭ Hungariajn Ciganajn lingvojn. La Katedro pri Lingvistiko de 1996 provizore ĉesigis la lingvoinstruadon kiel fakon „dormanta”, sed post tragika morto de la katedro-gvidanto ĝi ĉesigis definitive tion. En la Scienca Universitato de urbo Pécs [pe’ĉ] de 1996 ĉe la Lingvistika katedro de la Filologia-sciencia Docentaro en kadro de Romologia specializacio (tio lasta signifas, ke ĝi estas libere elektebla eduka ebleco kiun la profesorado senkoste donas, kaj ĝi bezonas tutan enprofundiĝon siaterene.) komenciĝis instruado de la lingvo Beaŝ, kio daŭras ĝis hodiaŭtago. El la du oficiale rekonitaj lingvoj Ciganaj universitatajn studojn nuntempe nur ĉe la Fakultato Romologio de la Scienca Universitato de Pécs povas daŭrigi kaj la Ciganojn, kaj la pliajn studentoj de la universitato. Sed tiu ĉi edukado ĝis nun ne donis instruistan diplomon. Pro tio la katedro akreditis kaj tiel malfermiĝas jam ebleco akiri ankaŭ instruistan kvalifikon apud la filologia diplomo. La celo estas, ke tiuj studentoj, kiuj disponas per „C” tipa lingvoekzameno el iu lingvo Cigana, sed ĝis nun ne frekventis pedagogiajn kursojn, ne estas pedagogoj, apud ilian filologian diplomon ili povu akiri ankaŭ kvalifikon instruistan. Tiu ĉi kvalifiko enhavas la fak-metodikajn konojn necesajn al instruoj de la konomaterialo pri la Ciganpopolo kaj lingvoj Cigana aŭ Romani. Ĉio ĉi kompetento estas en si mem pli malmulta ol la diplomo de instruisto lingva aŭ instruisto popolkono-faka, ja tie ĉi la studentoj akiras tiajn fonetikajn, morfologiajn kaj sintaksajn konojn, kiel ĝenerale la lingvo-fakuloj, sed ĝis estigo de la lingvoinstruista eduko tiu estas la sola tiu instruiteco, kiu helpas al la pedagogoj konantaj la lingvon – minimume mezgrade – por fini unuspecian agadon multiplikantan en la klerigaj institucioj. La lineara eduko – laŭ la tielnomata procezo de Bologna – parto estas la Beaŝ- kaj romani lingvo instruado, ankaŭ de la trijara baza edukado Romologia, en la majstro-instruado (jarkursoj 4.5.) estiĝas ebla la akiro de diplomo filologia aŭ instruista. Ekde la jaro 2006a ekiris ankaŭ la Instru-sciencia doktora lernejo ĉe la PSU (Scienca Universitato de Pécs) kaj FSF (Filologia Scienca Fakultato), kies unu programo la Romologio donas eblon al la studentoj al la plu edukado, al la instruistoj kaj doktor-studentoj al la scienca laboro. Ja se la solvon signifus, se kiel eble la plej fue ni povus fini tiujn bazajn esplorojn, povus estiĝi tiuj helpantaj- kaj fonosciencoj, laŭ kies bazo povus ekiri la elforma instruado de lingvoinstruistoj de lingvoj Beaŝ- kaj Romani – simile al aliaj lingvoj.

3.3.1. Resumo kaj pritakso de enhavo de Romologi-objektaj super-instruadaj programoj

En supera instruado la 129/2001(07.13.) registara edikto parolanta pri kvalifikaj postuloj de filozofi-sciencaj kaj iuj socisciencaj fakoj baz-edukaj fakoj decidas pri la bezonataj kvalifikaj postuloj por akiro *de diplomita romologi-faka faksperto pri filozofio*. Tiu ĉi instruado ĝis nun ekiris nur en la Scienca Universitato de Pécs. En fako romologio de Filologia Fakultato en 2000, laŭ la postuloj ekiris klerigo de tiuj filologoj, kiuj akireblas transprenajn konojn sur tereno de la romologio, asociite kun fakoj instruista aŭ sociaj

dum dek duonjaroj. *La fako romologio en baza instrua formo, direktigante al akiro de la unua diplomo nur en taga sekcio estas finebla en parigo de fakoj nur kiel fako "Bo".* En la studjaro 2005/2006-a, la studentoj gajnintaj akcepton povas fini iliajn studojn ankoraŭ en la tradicia instru-sistemo kvin jara. La nomo de kvalifiko rolanta en la diplomo estas *diploma filologo aŭ instruisto pri fako filologio.*

Dum sinsekvo de la klerigoj kiel en studobjekta strukturo enkondukaj bazaj-studoj kun konoj sociologiaj, socio-psikologiaj, ĝeneralaj filozofiaj, demografiaj, eduko-sciencaj povas la studentoj konatiĝi. En rondo de la fundamentigaj studobjektoj ili okupiĝas pri la ĉefaj rilatoj kultur-antropologia, eduko-sociologia, lingvistika alproksimiĝo al la Ciganaro direktigantaj esploroj, pli ĝuste per la ĉefaj karakterizaĵoj de situacioj socia kaj kultura de la Ciganaro Hungaria, per situacio de la Ciganaro Eŭropa. Ceteraj studobjektoj socisciencaj same rolas en la instruado pri: etnografi-scienco, juro, demografio, sociologio, soci-geografio, psiko-lingvistiko, soci-lingvistiko. La studobjektoj enkondukas en iujn disciplinojn, demandojn rilatajn al la ciganaro, ili esploras el vidpunkto de la konkreta scienco. Ankaŭ la studobjektoj socialpsikologia kaj pedagoga rolas grandakcente ellevitaj en studprogramo de la fako, de kio la ĉefaj temoj atingintaj la konkretan teritorion estas la karakterizaĵoj de la socializacio kaj la etna identiĝo, la socialaj personaj konvinkiĝoj kaj ilia mezurado, familia kaj institucia socializado, stato de la ciganinfanoj en la instruado, organizmo en la infandefendo kaj ĝia funkcio, eduko por akcepto de la instruado de plenkreskuloj, la malsameco kaj eduko al la paco, multkulturalismo, interkultura kaj eduko antirasisma. La ĝeneralan fundamentadon, la vcastaskal- tipan trarigardon de kelkaj sciencobranĉoj sekvas la alproprigo de la romologiaj/ciganologiaj fakobjektoj. En ties kadro oni okupiĝas per historio, la objekta etnografio kaj folkoro, la cigana muzikfolkloro, politika organizadiĝo, kulturala aŭtonomio de la hungaria ciganaro, per la ciganaro en la medio, kaj la kreaĵoj de la hungariaj cigan-artistoj. Cigana, - Beaŝ kaj Romani lingvohoroj certigas la eblecon, por ke la studentoj, estontaj specialistoj, povu atingi originallingve la ciganlingve skribitajn kaj parolajn materialojn. Nuntempe la ling vaj kursoj finiĝas per universitataj bazaj ekzamenoj, kiun multuloj okazigas per la "C" tipa ŝtate akredita lingvoekzameno de la ŝtata bazgrada lingvoekzameno. Dum la 2005/2006-a studjaro en la romologia baz-eduko ĉ. 50-60, la duobla-diploman instruon 120 personoj partoprenis. Kvazaŭ 40% de studentoj apartenas al cigana komunumo. Dum la pasintaj jaroj konstateble kreskis nombro de la ciganaj studentoj. La grandparto de tiuj ĉi studentoj elvenis el inter lernantoj de gimnazio Gandhi al la universitato, kio estas eksterordinare ankaŭ en si mem ĝojiga, longdistance certigas novularon por la eduko daŭranta eduko. Pri la kvalifikaj postuloj de „kono de la cigansocio” fakdirekta pluinstrua fako parolanta edikto 21/2000.(03.VIII.) decidis pore la altlernejs pedagogio fakon finanta studentoj, la postulsistemon bezonatan al alkiro de pedagoga faksperteco fakdirekta socikono cigana. La institucioj pedagogedukaj povas ekirigi kursojn en propraj agosferoj. Por duoble diplomitoj ekde septembro de 2002. al ekirigo de akredita romologia fakdirekta plueduka fako, en la Instruistformada Altlernejo de Universitato de urbo Kaposvár [kapoŝvar] estas ekirigebla per validiĝo de la edikto 20/2001.(30. VI.) OM. modifinta la edikton 41/1999.(19. X.) –an, sed nuntempe tiu ĉi pluinstrua fako tie ne funkcias. En la Scienca

Universitato „Eötvös Lóránd” [lorand oetvoeŝ] kaj en la Scienca Universitato de Szeged en la pedagogifaka instruado oni anoncas ankaŭ apartajn romologiajn kursojn. La pluedukon de la praktikantaj pedagogoj regulas la Registara Dekreto 277/1997. (22. XII.). La leĝo parolanta pri la publika instruado - iujn taskojn, kiel provizojn de la institutogvidantaj, praktikogvidantaj taskoj apud la pedagog-faka kvalifiko - ligas al plenumo de la pedagogia fakekzameno. La pedagoga fakekzameno plenumbla estas en fakdirekta pluinstruado, kies instruajn postulatojn decidas la edikto 41/1999.(13. X.).

Oni daŭrigas romologian instruadon en la Katolika Altlernejo „Apor Vilmos”, funkcianta en urbo Vác, kie oni daŭrigas Cigan’/roma naciminoritan infanĝarden-pedagogian- kaj Cigan’/roma naciminoritan instruadon. (La instruado de infanĝardenpedagogoj kaj instruistoj ankoraŭ nun ne estas eniĝinta en la instrusistemon linearan.) Oni donas eblecojn - ligiĝante al ilia romologia instruado - por la lingvoalproprigoj kaj kaze de la Lovari kaj la Beaŝ, sed nuntempe estas nur studentoj lernantaj la lingvon Lovari. El la antaŭaĵoj evidentiĝas, ke hodiaŭtempe en la altinstruado plurloke funkcias Romologia Fakultato, kaj fakultata grupo, sed postgraduala (post la unua diplomakiro daŭrigita instruado por akirigi la duan diplomon) universitata instruado okazas nur en Universitato de Pécs.

Pro la instruado de la Romologia kaj Eduksociologia fakultato de Universitato de Pécs, funkciantaj jam ekde kvin jaroj, grandega estas la interesiĝo ne nur en rondo de la fakaj studentoj, sed ĝenerale ankaŭ en rondo de interesanta studentaro pri problemoj de la ciganaro. Sed la personaj kondiĉoj de la fakultato tute ne estas bonproportiaj pri kvanto kaj kvalito de la atendita laboro. La fakultato ĝis 2003 funkciis nur per 3 ĉefofica posteno. Ekde la 2002/2003a studjaro la nombro de oficoj plikreskiĝis per unu, kaj en la fakultato ordiĝis ankaŭ situacio de la dungitoj en ŝtataoficistaj dung-rilatoj, sed tiu ĉi estas ankoraŭ ne sufiĉa. Al plenumo de la multtavolaj administraj taskoj la fakultato havas entute duonan oficon. Ĝi certigas siajn funkcielspezojn el tiuj konkursoj, kiuj donas subtenon al taskoj de scienca esploro, sciencoorganizado, eldonaĵ-eldonadoj, eĉ komunum-organizado ligiĝantaj al la instruado.

3.4. La lingvo Beaŝ en la scienca esploro

Konsente pri la 2002. printempa propono de Konsilio de la Hungara Scienca Akademio, la Lingvosciencia Instituto ekirigis ciganlingvan esplorprojekton. La esploristoj resumis la esplorinstruojn koherajn kun situacio de la hungaria cigan-minoritato, nome la proprecojn de lingva-vidmaniero de sociologiaj ekzamenoj koncernaj al lingva tavolo de la hungaria cigan-minoritato. Kadre de projekto OKTK-a, titolita „*La ciganaj lingvoj, ciganaj komunumoj: la kompleksa (malsimpla, kunmetita) lingvistika esploro de la lingvoj Romani kaj Beaŝ*”, oni ellaboris al la ciganaj lingvoj rilatajn fakliteraturojn landan kaj internaciajn koncernaj la lingvoŝanĝon kaj lingvan revivigon. Printempe de 2009 pretiĝis la priskriba gramatiko de la lingvo Beaŝ.

3.5.Lingva ekzamenigo

Severan zorgon signifis – en lingvo-ekzamenigo de lingvoj de minoritatoj – la apero de la 71/1998.(8.VI.) numera registara ordono parolanta pri la nova reguligo de la lingvo-ekzamenigo, kiu ligis al akredito la agadon lingvoekzamenigan.

Sekve la ekvalidiĝon helpe de subteno de la la Ministerio pri Publika Instruado denove estas ebleco por fari ŝtate rekonitan lingvoekzamenon el la lingvoj: bulgara, horvata, pola, cigana (Beaŝ kaj Romani), germana, rumana, serba, slovaka kaj slovena. La plimulto de la ekzamenejoj estas ja trovebla ankoraŭ en la ĉefurbo, sed en 2002 ankaŭ plurloke en la lando malfermiĝis ebleco por farebli ekzamenojn el la lingvoj de minoritatoj vivantaj en konkreta regiono. El inter la ciganlingvoj, la Beaŝ sukcesis iĝi al akredita lingvoekzamenejo en la PROFEX Ekzamencentro de Pécs, kies rezidejo estas la BTK NTI Romologia kaj Eduksociologia Fakultato de la Scienca Universitato de Pécs. La akredita ekzamenejo donas ĉiujare dufoje eblecon al akiro de lingvoekzameno Beaŝ. La ekzamenejan popularecon montras, ke de 2002 el 282 ekzamenatoj 187 faris sukcesan lingvoekzamenon el lingvo Beaŝ ĉe baza, meza aŭ supera gradoj.

4.Evoluigaj Ebloj de Instruo en la Publika kaj Altinstruo

Unu el taskoj plej aktualaj kaj plej gravaj estas la antaŭpreparo de la instruo de lingvoinstruistoj. La Ministerio pri Publika Instruado montris nenian aktivecon en la lastaj jaroj pri la legitimado de ekzamen-cirkonstancoj kaj sur tereno de antaŭpreparo de la kadro-instruistoj. La ordono faranta ebla la instruon de cigan-lingvoj elmetas la pedagogojn al severa subigiteco, tial la faka helpo bezonatas neforlaseble al ilia laboro. Povas esti unu helpo al la helpdono la en Universitato de Pécs realiĝanta instruo de fakmetodoligo, sed tio ĉi estas atingebla helpo nur por la studentoj lernantaj en la romologifako de la universitato ĝis kreo de kondiĉoj de lingvoinstruista-instruo. Ĉar la kreo de kondiĉoj de la lingvoinstruista instruo esatas tasko ŝtata, gravas ke la ŝtato entreprenu la kunordigantan agadon inter la koncernatoj, aŭ elektu tiun institucion kiu finos tiun agadon. La patrinlingvaj aktivuloj okupiĝantaj per la lingvo estas por tio nekapablaj, ne povas esti ilia tasko por ke ili trarigardu la bezonatajn agendaĵojn al ekirigo de la lingvoinstruista instruo. Ĉiumaniere necesas la kunlaborado de la lingvojn instruantaj universitatoj kaj la Lingvosciencia Instituto de la Hungara Scienca Akademio. La universitatoj povas certigi la studentojn al la necesaj baz-esploroj, la terenon kaj la fakkonon, la lingvikoj de la Lingvosciencia Instituto aliĝas al fortigo de la fonoj teoria, faka. Gravas, ke la ĝis nun akiritajn rezultojn la universitatoj dum la lingvoinstruo povu uzi, povu elprovi, la rezultojn plibonigu – pro tio estas nepre la kunlaboro de universitatoj kaj Lingvosciencia Instituto. Pri la lingva stato de Beaŝ-ciganaj komunumoj necesas pliaj scienco-pretendaj esploroj, enketoj en pluraj lingvaj komunumoj en intereso de elformo de strategio trapensita kaj fundamenta lingvoplananta. Ĉiam disvastiĝas la intereso al la minoritataj lingvoj, sed mankas la kondiĉoj al kontentigo de pretendoj (lingvokursoj, pluinstruoj al la lingvoinstruistoj, gramatikaj lernolibroj, multimediaj iloj, ks.) Manke de scienc-baza lingvoplanado kaj stabliigo regul-kreado – ĵus pro kreskiĝo de socia interesiĝo – grandan danĝeron signifas la disvastiĝo de sensciencan rigardon nehavantaj

verkoj. (Tion pli kreskigas la manko de la legitimo de la Instrua Ministerio iniciatita kaj preparita Beŝ/Romani lingva postulat-sistemaro.) Per aldono de la eblecoj priskribitaj en la sekvoj povus fundamentiĝi la lingvoinstruist-instruo enkonstruigada en la jam estanta altinstrua strukturo, kiu eĉ ankaŭ niatage ne havas personajn, objektajn kondiĉojn.

La realigindaj evoluigaj taskoj:

Kvankam pretiĝis la Beŝ-gramatiko, sed al perfektigo de la laboro estus tre utilaj pliaj esploroj fonetikaj, morfologiaj. La priskribo de Beŝ-sintakso, ĝia semantiko, lingvohistoriaj baz-esploroj, antropologitaj esploroj kaj parollingvaj esploroj apenaŭ komenciĝis, ties esto estas havebla al kreo de studmaterialo al instruo pri lingvoinstruistoj. Apud la esploraj-evoluigaj taskoj estas bezonataj ankaŭ primaraj novecigaj evoluigoj. La privortaraj laboradoj, komputila korpuskla-lingvistiko (**pri korpuskla lingvistiko oni parolas kiam baze de privediciditaj rigardpunktoj elektita teksto-kvanto, finas esploradon la lingvisto**), elformo de iu lingvistika scienca kaj informa centro iĝas grava nome pro la moderna fikso kaj depono de atingitaj rezultoj sur tereno de lingvo Beŝ. Supozeble la rondo de realigendaj taskoj estas multe pli vasta, sed per komenco de ĉi laboroj ni ne povas malfruiĝi longtempe, pro intenseco de procezo de lingvo-ŝanĝado inter la lingvoj Beŝ kaj Hungara.

Resumo

Al plifortigo de la minoritataj lingvoj, al la turno kontraŭflanken de la lingvoŝanĝo ekzistas diversaj manieroj, sed sen apogo de la majoritata socio tiuj ĉi provadoj estos malplie sukcesaj.

En la plej multa minoritata parolanto estas trovebla la sinteno kontraŭ al la propra lingvo, sed se la majoritata socio ne helpas ties konsciigon, ke la de ili parolata lingvo same valora estas, kiel iu ajn alia lingvo, ĉi pozitiva sinteno malheliĝas.

La instruo devus hepi kreon de imponeco de la lingvo. Oni devas movi antaŭen, ke la minoritata lingvo povu aperi en ju pli funkcio, povu esti patrinlingvaj presaĵoj, disaŭdigoj, televid-elsendoj, patrinlingva instruo – laŭeble ĉiunivele, inkluzive ankaŭ la mez- kaj altgradan instruon. Tiu ĉi rezultas ankaŭ lingvo-vigligon per tio, ke ĝi ampleksigas la rolgrupojn kaj scenejojn de la minoritata lingvo uzata en baritaj funkcioj. La transdono de la lingvo Beŝ nur tiam reiros inter la naturajn kadrojn de la familio, se en tiuj funkcioj fortiĝas, ĝia prestiĝo kreskiĝas kaj danke ĵus al la paŝoj revivigaj, kaj estos ankoraŭ kontentiga nombra patrinlingva parolanto kiu iĝas interesato en transdono de la lingvo Beŝ. (Bartha, 1999:129)

Sed al tio ĉi ju pli oni devas elformi tiun apogan aldonan instrumedion, kiu helpas denove plivalorigi la patrinlingvon en la lingvotransdono intergeneracia.

LITERATURO

ACHIM, Viorel. 2001, Ciganoj en la historio Rumana. Budapeŝto: Osiris, ISBN 963-379-913-9.

BARTH, F. 1996. Malnovaj kaj novaj problemoj en la analizado de la etna identiĝo. Régió, 1, ISBN 0865-557X.2-25.

BARTHA, Csilla. 1999. La fundamentaj demandoj de la dulingveco. Nacia Lernolibro-eldonanto. ISBN: 9631900096.

- BORBÉLY, Anna.2001. Lingvoŝanĝo. Hungara Scienca Akademio Vivlingva Klaso Budapeŝto/ ISBN 963-9074 28 4.
- DEX (Dicționarul Explicativ al Limbii Române). 1996. Ediția a II-a, Academia Română, Institutul de Lingvistică „Iorgu Iordan”,București: Univers Enciclopedic. ISBN-88-87740-00-3
- ERDŐS, Kamill. 1958, la Ciganaro de Hungario. Gentoj, Nacioj. EtnografiajKomunikaĵoj, n-roj 1-2. . 152-173. ISSN 0028-2774
- FERGUSON, Charles A. 1975. Diglosio. Trad. IVÁNYI, Tamás. In: PAP, Mária – Szépe, György (red.) Socio kaj Lingvo. 291-317. ISBN 9632800532
- FILIPESCU, T. 1906. Coloniile Romane din Bosnia. București.
- FISHMAN, Joshua. 1973. Language modernization and planning in comparison with other types of national modernization and planning. Language in Society 2, 23-43. ISBN 0-19 437191 3
- FLECK, Gábor - VIRÁG, Tünde.1999. Pasinto kaj nuno de iu Beaŝ-a komunumo. MTA PTI Regiona Esplorcentro Budapeŝto. ISBN 963 9356 15 8
- FRASER, Sir Angus. 1996. La Ciganoj. Eldonejo Osiris Osiris. Budapeŝto. ISBN 963-7615-25-3
- GARAMI, Zs.- SZÁNTÓ, J. 1991. Slovakoj de Hungario. Budapeŝto. TÁRKI ISBN 963-210-589-3
- GUMPERZ, John J. 1971. The Speech Community”. Anwar S. Gil ed. Language in Social Groups. Essays by John J. Gumperz. Stanford: Stanford University Press. 114-128.
- HABLICSEK, László.1999. Loĝantarevoluo en Eŭropo, nepre en Hungario Népeŝsĝfejlódés In: Nánási, Irén (verk.): Humanekologio. Budapeŝto, Medicina.333–356. ISBN 963-242-960-5
- Rekomendoj de Haga. 1996. La Rekomendoj kaj substantiv-epitetaj Rimarkoj de Hague temante pri instru-raĵtoj de la Naciaj minoritatoj: Inter-etnaj Kontaktoj Fondaĵo, ISBN 80-8062-273-6
- HAVAS, Gábor, KEMÉNY, István, KERTESI, Gábor. 1998. La relativa cigan-instruado sur tereno de la klasifikiga lukto. Kritiko, marto. ISSN 0865-557X
- HOÓZ, I., KEPECS, J., KLINGER, A. 1985. Demografia situacio de la naciaj minoritatoj vivantaj en departamento Baranya [baranja] en 1980. Pécs: Esplora Centro de Regionaj esploroj. ISBN 963 212 557 6.
- HOROWITZ, D. L. 1975. Ethnic Identity. In: N. Glazer-D. P. Moynihan (eds.) Ethnicity: Theory and Experience. Cambridge: Harvard University Press, 111-141. ISSN 0865-557X
- HYMES, Dell.1979. Ekzameno de interefikoj de la lingvo kaj la socia vivo. In. Pléh Cs. – Terestyéni, Tamás (Parolfaro–komunikiĝo–interagado. Amas-informada Esplorcentro, 213-263. Budapeŝto. ISBN:978 963 05 8658 0
- KEMÉNY, István, HAVAS, Gábor, KERTESI, Gábor.1997. Landa ekzameno fidele reprezentanta 1993-94. Raporto de la Sociologia Institutp de la Hungara Scienca Akademio, in: Ciganaj sociologi-eseoj - Sur periferio, Fondaĵo Ariadne, Budapeŝto. ISBN 963-05-7992-8.

- KEMÉNY, István, JANKY, Béla, LENGYEL, Gabriella. 2004. La Ciganaro de Hungario, 1971-2003. Eldonejo Gondolat - Hungara Scienca Akademio Instituto Etna-Nacia Minoritatojn Esplora Instituto, Budapeŝto, 2004, 192. p. ISBN 963-9567-65-5
- KEMÉNY, István, JANKY, Béla. 2003. Situacio de la Cigana loĝantaro. landaj ekzamenoj. In: Kállai, Ernő (red.). Situacio de la Hungaria Ciganaro komence de la 21a jarcento. esploraj promptaj anoncoj. Hungara Scienca Akademio Instituto pri esploro de Etnaj-naciaj minoritatoj.
- KEMÉNY, Márton. 2002. Muziko, lingvo kaj literaturo de Ciganoj kaj Sinti-oj. Minoritat-esploroj. 11. jarkolekto. n-ro 1. ISSN, 1215 2684.
- KENRICK, Donald. 2005. Ciganoj de la Gango ĝis la Danubo kaj la Temze. Eldonejo Pont. Budapeŝto. ISBN 963-7265-04-X
- KERTESI, Gábor, KÉZDI, Gábor. 1998. La cigan-loĝantaro en Hungario. Dokumentaro kaj datumstoro, Socio-tipo. Budapeŝto. ISBN 963-03-6352-6
- KONTRA, Miklós. 2003. Niaj Ciganoj, iliaj lingvoj kaj rajtoj. Kritiko (1): 24-26. ISSN, 0324 7775
- KOVALCSIK, Katalin, RÉGER, Zita (gasto-red.) 1999. Acta Linguistica Hungarica. (46) 3-4; (Eseoj pri la lingvo Cigana-angla lingva) ISSN 1418-253x
- KOVALCSIK, Katalin. 1993. Popol-muzikaj tradicioj de la Ciganoj Beaŝ-aj. In: Barna, Gábor (red.), Cigan-etnografiaj eseoj I. Eldonejo Mikszáth, Salgótarján. 231-238.
- KOVALCSIK, Katalin verk. 1998. Eseoj el rondoj de socia situo kaj kulturo de la Ciganaro. Malgranda biblioteko de Instruistoj 9.
- CENTRA STATISTIKA OFICEJO - 2001. jara censo, 4. Nacieca kontaktiĝo. Datumoj de la naciecaj, etnaj-minoritatoj. Budapeŝto, 2002.
- LADÁNYI, János, SZELÉNYI, Iván. 1997. Kiu estas Cigano? In: Naskiĝi al Cigano – Eseoj, dokumentoj. Fondaĵo Aktiva Socio – Eldonejo Új Mandátum 179-191.
- LIÉGEOIS, Jean-Pierre. 2002. Naciminoritatoj kaj la instruo: Ciganoj en la lernejo/ Jean-Pierre Liégeois; Elfrancigis. Oláh, Judit; Eldonejo Pont
- HUNGARAJ STATISTIKAJ KOMUNIKAĴOJ. 1985. Rezultoj de la Cigan-nombrado okazigita je la 31-an de januaro en 1893 en Hungario. Új folyam, volumo IX.
- MEZEY, Barna, POMOGYI, László, TAUBER, István. 1986. La cigan-situacio de Hungario laŭ dokumentoj 1422-1985. Libroeldonejo Kossuth: Budapeŝto. numeroj-ISBN: 963-09-2851-5
- N. BÉKEFI, Margit. 2001. La Trogon-kavigaj Ciganoj de Hungario. Komunikaĵoj de Romologia esplora Instituto 4. Szekszárd. . ISSN 1418-6101
- N. IORGA. 1930. Anciens documents de droit roumain. Párizs-Bukarest, 22-23.
- NAGY, Pál. 1998. Libro pri: Historio de la Hungariaj Ciganoj en Epoko de la Feŭda Socio. Kaposvár. ISBN 9637172580
- NAGY, Pál . 2005. „Popolo de faraono” – Frua historio de la Hungariaj Ciganoj. Gypsy Studies – Eseoj Ciganaj. 15. Pécs. PTE BTK. ISSN 1586-6262

NEKH. 2005. Naciminoritatoj en Hungario 2004-2005. Nacia kaj Etna Oficejo Budapeŝto. ISBN 9638443251

ORSÓS, Anna.1997a. Lingvaj grupoj de la Hungariaj Ciganoj In: Cigan-etnografiaj Eseoj 6. Budapeŝto. ISSN 1217-8853

ORSÓS, Anna, KÁLMÁN, László.2009. Gramatiko Braŝ-a. (Kun Kálmán László) Budapeŝto, Hungara Scienca Akademio. Libroeldonejo Tinta. Budapeŝto. ISBN 978-963-9902-25-1

Sinjorino PÁLMAI - ORSÓS, Anna – VARGA, Aranka.2001. Stato de la lingvo Beaŝ-a. Lernejkulturo 12. sz. ISSN 1215-5233

Sinjorino PÁLMAI - ORSÓS, Anna. 2004. Soci-lingvika situacio de la lingvo Beaŝ-a. In. Gypsy Studies – Eseoj Ciganaj 10. kötet. – Freŝaj Esploroj Ronde de la Romologio. Duaeldono. PTE BTK Pécs.15-25. ISBN 963 641 924 8,

Sinjorino PÁLMAI - ORSÓS, Anna. 2005. Dimenzioj de la Lingva Alieco: Gardeblecoj de la lingvo Beaŝ-a. Educatio. ISSN 1216-3384

PAPP, Gyula.1980. Help-materialoj al disvolvo de komunikadaj pretendoj de la Beaŝ-cigan infanoj. Instruistojn Eduka Altlernejo, Pécs. (Eseoj el ekzamenoj de laborgrupo okupiĝanta pri instruado, eduko de la Ciganaj infanoj II.) ISBN 963 641 086 0

PAPP, Gyula.1982. Rumania dialekto de la Beaŝ-aj Ciganoj. JPTE Instruisteduka Altlernejo, Pécs. (Eseoj el ekzamenoj de laborgrupo okupiĝanta pri instruado, eduko de la Ciganaj infanoj V.) ISBN 963 641 099 2

PAPP, Gyula.1982. Beaŝ – Hungara Vortaro. Scienca Universitato Janus Pannonius: Instruisto-eduka Fakultato: Pécs. (Eseoj el ekzamenoj de laborgrupo okupiĝanta pri instruado, eduko de la Ciganaj infanoj VI.) ISBN 963 641 100 X

RÉGER, Zita.1987. Lingva sociiziĝo kaj lingvouzo inter la Hungariaj Ciganlingvaj komunumoj. Atelieroj el rondoj de la lingvistiko kaj socisciencoj. 3. 31-89

RÉGER, Zita.1978. „Cigana klaso” „miksita –klaso” en spegulo de la faktoj. Realajo. 8. 77-89. ISSN 0324-7228

RÉGER, Zita.1988. „La lingvo Cigana: esploroj kaj diskuto-punktoj.” Atelieroj el rondoj de la lingvistiko kaj socisciencoj. IV. Budapest, 155-178.

RÉGER, Zita.1990. Vojoj al la lingvo. Lingva socializado, lingva malavantaĝo. Eldonejo Akadémiai. Budapeŝto. ISBN 963 9074 32 2

RÉGER, Zita.2002. Cigana infan-mondo. Legolibro el la Cigana infanfolkloro. Eldonejo L'Harmattan. Budapeŝto. ISBN 963-14-0722-5

SARAMANDU, Nicolae.1997. Cercetări dialectale la un grup necunoscut de vorbitori ai românei: băiașii din nordul Croației. Fonetica și dialectologie, XVI, București. 7-130. p

SISÁK, Gábor red.. 2001. Naciaj kaj Etnaj-minoritatoj en Hungario fine de la 20. jc. Osiris – Hungara Scienca Akademio Minoritat-esplora Metiejo 2001: 267. ISBN 963 389 139 6

SKUTNABB-Kangas, Tove.1997. Lingvo, instruo kaj la etnaj minoritatoj (Minoritata Datumaro, VIII.). Budapeŝto, FondaĵoTeleki László. ISBN 963-13-5383-4

SUSAN, Gal.1992. Kio estas la lingvoŝanĝo kaj kiel okazas? (In: Kontra, Miklós red.. – Sociaj kaj teritoriaj varioj en la lingvo hungara. Budapeŝto. Hungara Scienca Akademio MTA Lingvika Instituto)

SZALAI, Andrea. 1997a. Limoj de la „ni” kaj „ili”, la Beaŝ-oj. 8. jarkolekto numero. 1. 104-126.

SZALAI, Andrea. 1998. Beaŝoj. In. Kovalcsik, Katalin (red.): Eseoj el rondoj de la socia situo kaj kulturo de la Ciganaro. Budapeŝto: BTF-IFA-MKM, 1998, 359-370. ISBN 963 8323 256

SZÉPE, György, DERÉNYI, András red. 1999. Lingvo, potenco, egaleco.lingvopolitikaj verkoj. Eldonejo Corvina. Budapeŝto. ISBN: 9780156584463

SZUHAY, Péter.1999. Kulturo de la Hungaria Ciganaro: estna kulturo aŭ ĉu kulturo de la malriĉeco. Eldonejo Panoráma. Budapeŝto. ISBN 963 243 834 5


TÁLOS, Endre.2002. La lingvoj Cigana kaj la Beaŝ-a en Hungario. In: Kovalcsik Katalin (red.) Eseoj el rondoj de la socia situo kaj kulturo de la Ciganaro. Budapeŝto: BTF-IFA-MKM. 295-303. ISBN 963 8323 256

ANEKSAĴOJ

Numero 1

Lingvoj de la Indoeŭropa lingvofamilio - laŭ apliko de la libro „Heredantoj de Babelo”

(eldonita en Budapeŝto, 1976) verkita de István Tótfalusi



Jen bildo pri arbo de la Hindeŭropa Lingvo-familio. Pri ĝi vidu la artikolon:
http://eo.wikipedia.org/wiki/Hindeŭropa_lingvaro

La nur hungarlingve parolantaj Ciganoj estas **ROMUGROJ /Karpataj Ciganoj/ 71%**

Ilia lingvo:

Karpata dialekto de lingvo **Romani**, de nun jam sur lingvoinsuloj ekzistas ili, ekzemple en **Versend**, Csobánka [veršend, çobanka].

Laŭ iliaj tradiciaj profesioj ili estas:

muzikistoj, adobofaristoj, najlon-forĝistoj.

Ilia loĝloko estas en:

Budapeŝto kaj ĝia ĉirkaŭaĵo, ekzemple en Pomáz, Zsámbék [pomaz, ĵambek], sur la norda bordo de la lago Balatono kaj en Transdanubio, ekzemple en Pécs, Mohács, Babócsa [peç, mohaç, baboça]

La du lingvaj Ciganoj havas du grupojn.

/1/ Cigan-gepatralingvaj VLAH-Ciganoj/kolomparoj 21%.

Ilia lingvo:

Ili parolas la malsimilajn dialektojn de la lingvo **Romani. (ĉ.13) (Erdős 1959)**

Laŭ iliaj tradiciaj okupiĝoj ili estas:

ĉeval-komercistoj, kupristoj, prilaboristoj de metaloj, kaldrono-flikistoj, tapiŝ-komercistoj, forĝistoj, akriĝistoj, subtendaj-komercistoj ktp.

Ilia loĝloko:

Ili vivas sporade en la tuta lando / ĉefe en urboj.

/2/ Rumaniaj gepatro-lingvanoj BEAŜ-OJ 8%.

Ilia lingvo:

ili parolas la arkaikajn dialektojn de la rumana lingvo: la adjelan-an, munĉan-an, tiĉan-an.

Iliaj tradiciaj okupiĝoj estas:

trogo-kavigado, pretigadoj de lignokuleroj, korbo-plektado.

Iliaj loĝlokoj:

En la regiono Suda-Transdanubio ĉefe en departamentoj Somogy, Tolna, Zala, Baranya [ŝomodj,baranja], en la Transtibiska regiono en ĉirkaŭaĵoj de la setlejoj Tiszafüred, Tiszadada.

Laŭ datumoj de 1971. jara esploro estrita de sinjoro István Tótfalusi

Hungaraj sukcesoj dum la 30a Somera Olimpio

Hungario ne estas miraklolaro tial, ĉar atingis dum la Olimpio de Londono 9. lokon en 2012. La hungaraj sportistoj akiris 8 ormedalon, 4 arĝentmedalon kaj 5 bronzmedalon. Ĉi tiuj sukcesoj pretendis multe da laboroj, persistoj, fortostreĉoj. Aliaj aferoj, vundiĝoj okazis, kiujn la labortaga homo ne scias, nur konas la sukcesojn. La multe da laboroj, fortostreĉoj povas kaŭzi restendajn vundiĝojn, kiuj malhelpas la puajn sukcesojn de la sportistoj. Ni esprimas niajn rekonon al la hungaraj kaj alilandanaj gesportistoj, kiuj montris belan ekzemplon de la laboro kaj persisto por venki. Ni deziras al ili forton, sanon kaj sukceson al la plua vivo

s-ino Adri Pásztor

La 20a de Aŭgusto

La 20-a de aŭgusto estas festo de fondo de la hungara ŝtato, kiu estas la plej malnova nacia festo de nia patrujo kaj festo de nia unua hungara reĝo. Dum tiu ĉi tago iĝis Hungario vera eŭropa ŝtato.

Originale la 15-a de aŭgusto estis festo - datreveno de juĝado kaj morto de nia Sankta Stefano-, kiu nur de 1083 iĝis la 20-a de aŭgusto, kiam reĝo László la Sankta sanktigis nian unuan reĝon.

En Miskolc dum la festa programo rolis Karlo Nemcsák, aktoro kaj la „Montazs/Muntaĵo” Drampedagogia kaj Popolkleriga Societo de Miskolc.

La programo enhavis dispecetigon de pano, beno de pano kun reprezentantoj de la eklezioj, kaj transdonon de hungaraj ŝtatanaj dokumentoj kaj ŝtatana ĵuro. La honordiplomojn transdonis doktoro Ákos Krizsa.

Belegaj panoj pretiĝis okaze de nia nacia festo, la 20-a de aŭgusto.

Preparo de glaciaĵo kaj parfeo

En aŭgusta programo de muzeo Herman Ottó estis inter aliaj la ekspozicio pri historio de preparo de la glaciaĵo kaj parfeo, kiu havis grandan sukceson.

Esperantigis László Pásztor

Tereza Kapista

Mia Avino

La patrino de mia patro estis nur 26 jara kun kvar infanoj kiam mortis ŝia edzo, dum la Unua mondmilito. La fronto ne estis tro for kaj la batalantaj kamaradoj sukcesis hejmen transporti lian korpon. Ĉirkaŭ la ĉerko staris la tri filoj, la filino kaj la juna vidvino.

Kion fari kun tiom da infanoj sen laboro, sen mono? Same estis problemo ĉu la avino trovus laboron, kaj kiu zorgos pri la infanoj dum ŝia foresto. La solvo tamen montriĝis. Mia praavo, la patro de mia avino, laboris en la brikejo kiel librotenisto.

La posedanto de la brikejo estis ege kontenta kun la laboro de mia praavo kaj aŭdante pri la okazaĵo, donacis dometon kun du ĉambroj al vidvino, tuj apud la brikejo. Do, la infanoj povis ludi en korto de la brikejo, eĉ la avo povis kontroli ilin tra la fenestro de brikejo. Ankaŭ, iu donis ideon ke mia avino vendadu florojn ĉe la vendoplaco. Ŝi regule faris tion, ĉu dum pluvo, aŭ sunbrilo. La plej

aĝa knabo devis eklabori, bonŝance, la amiko de la brikfabrikisto estis fotisto havanta belan fotoateljeron kaj diris:

–Sendu la knabon mi vidos ĉu uzeblas por tiu metio aŭ ne.

En tiu tempo post Unua Mondmilito, esti fotisto signifis preskaŭ kiel antaŭ 20 jaroj esti komputisto.

La plej aĝa filo estis nur 15 jara. Li ne nur ellernis la metion, eĉ sukcese laboris ankaŭ malfermante, en postaj jaroj, propran fotoateljeron. Lia firmao funkciis dum 55 jaroj en la centro de la urbo Subotica. Ĉe li, post kelkaj jaroj ankaŭ lernis la plej juna frato kaj fariĝis bonega fotisto, ĉe Adriatika maro en Omiš, proksime de Split.

La knabino estis la plej aĝa, sed ŝi devis restadi hejmen kuiri al la familio kaj al la laca patrino. Por kvar infanoj la plej granda elspezo estis por ŝuoj. Precipe vintre kiam sen botoj oni ne povis forlasi la domon kaj frekventi la lernejon. Tiam la neĝa alteco pligrandis ol en nuna tempo. Pro tio mia avino konatiĝis kun ŝuisto kaj petegis lin akcepti mian patron por ellerni ŝuistan metion. Mia patro tion faris tre nevole. Tamen jam post unu jaro li kapablis fari ŝuojn al gefratoj kaj patrino. Poste li forlasis tiun metion kaj fariĝis komercisto havante belan ŝuovendejon en centro de la urbo.

Kiam la plej aĝa frato malfermis sian propran fotoateljeron, sufiĉe rapide li povis kun helpo de aliaj fratoj malfermi florvendejon en centro por sia patrino. Tio estis grandega paŝo, mia avino ne plu devis subĉiele vendadi la florojn. La vendejon helpis ekipi kaj, verdire senpage luis al avino, la sama brikfabrikisto kies posedaĵo estis la duetaĝa domo en kiu ternivele estis la bela florvendejo. Do, troviĝis helpemaj homoj kaj la familio bone prosperis kaj fariĝis sukcesa.

La problemo estis nur kun la knabino, ŝi kreskis ĉiam laborante por la familio, ne iradis amuziĝi, ne trovis junulon kaj ne edziniĝis. Sed mia kara avino ĉiumonate aĉetadis tolaĵon, damaskon, donante al specialistoj kiuj brodis belajn kusenojn kaj tablotukojn.. Ne mankis la kovriloj kaj kusenoj plenigitaj per anasa plumo sen kio eĉ unu doto ne estis kompleta. Silkaj kombineoj ktp. Do, la doto jam preparita, ordigita en ŝranko nur atendis la junedzon kiu venos kaj svatos la filinon. La jaroj pasis kaj ŝi ankoraŭ ne trovis konvenan kandidaton por edzo.

La Dua mondmilito jam preskaŭ finiĝis kiam urbo Subotica estis bombardita. La avinon iu invitis denove el brikfabrikejo, kiu troviĝis rando de la urbo, por tie pasigi la , lastajn tagojn antaŭ fino de la milito.

Ŝi nenion prenis el la loĝejo nur la doton de la filino, kaj sur vilaĝa ĉevalĉaro tio estis stokitaj kaj alportita al eksterurba dometo. Tie troviĝis du litoj kaj ŝi tre zorgeme ĉion kaŝpakis en la liton kaj kovris bonege ke aspektu kiel matraco.

La urborandon jam atingis la unuaj Sovetaj soldatoj kiuj devis traserĉi ĉiun domon por kontroli ĉu ie ekzistas iu suspektinda persono aŭ militiloj.

Je grandega miro de mia avino la rusa soldato eniris ĉambron kaj direktis sin rekte al la lito. La avino staris defendante la liton kaj klarigante, ke estu li humana, tio estas ne varoj por nigramarkato sed la doto por la filino kiu jam alporksimiĝas al la 35a jaro kaj ankoraŭ ne edziniĝis, kaj se li nun forprenos la doton, ŝi neniam plu povos edziniĝi.

–Filo kara, komprenu min, ne malfeliĉigu nin, verŝajne ankaŭ vi havas fratinojn, veis mia avino, kunmetante petege la polmojn.

– Haraŝo, diris la soldato nenion komprenante sed nepre devis traserĉi la litojn, ĉar ili estis la plej konvenaj lokoj, kien kaŝi fusilojn.

– Ne faru tion kara, tion mi aĉetadis dum jaroj, mia kompatinda filino ĉiam laboris nur al familio, kaj se vi tion prenos ŝi restos senŝanca.

– Haraŝo... la soldato iom forpuŝis la avinon kaj komencis traserĉadi la alian liton.

– Ho, Dio mia, mi nun komprenas li deziras transporti min al Haraŝo, tiu certe estas urbo en fora Siberio. Sed eĉ se estas tiel mi la doton defendos. Portu min se vi volas, sed ŝian ŝancon mi ne transdonos al vi.

– Haraŝo.

– Kara mia filino, estu feliĉa, komencis ŝi plori, ne forgesu min, mi eble nenian revenos el tiu urbo Haraŝo fora kaj frosta Siberio.

La soldato foriris trovante nenion de la armiloj, kaj metante la manojn sur la ŝultro de mia avino denove dirante:

– Haraŝo!

– Jes, mi nun komprenas li foriris preni iun veturilon per kio ili portos min la tiu Haraŝo, sed kara filino mia, vi meritas mian suferon, vi ĉiam zorgis pri mi kaj viaj fratoj.

La avino bone vestiĝis, surmetis botojn kvankam estis nur oktobro kaj ploreĝante sidis ĉe tablo atendente la revenon de la soldato.

Intertempe preterpasis ĉe fenestro maljuna najbaro kaj aŭdante la ploreĝon kaj veadon eniris vidi kio okazis. Unue li miris kial ŝi sidas tutvestita en varmegaj vestaĵoj kaj botoj surpiedoj.

–Kia malbonaĵo okazis kun vi?

–Mia avino rakontis: Vensis ĉi tien rusa soldato, traserĉis la litojn en kiu estas la multekosta kaj bela doto, kaj diris ke gvidos min la urbo Haraŝo al Siberio. Nun mi atendas ke li revenu

La najbaro vere elkore ekridegis kaj klarigis al mia avino ke:

– HARAŜO en la rusa lingvo signifas BONE, tio tute ne estas urbo en Siberio, kreu al mi, mi estis dum unua mondmilito militkaptito en Rusio kaj mi konas la vorton. Li nur deziris diri al vi ke ĉio estas en ordo, ĉar li trovis nenion.

Ne estis facile trankviligi la avinon. Poste dum jaroj ni multe ridis pri tio.

Tiu lingva malkompreno aŭ diru miskompreno dolorigis la koron de mia avino.

Post kelkaj tagoj jam venis la rusaj soldatoj amase, kaj reportadis milojn da vunditojn el Germanio, ĉiu urba lernejo estis plena de vunditaj militistoj. Mia avino portadis al ili fruktojn kaj regalis ilin kriante haraŝo, haraŝo, karaj miaj filoj.

Mia onklino, la solfilino de avino edziniĝis en la sama jaro kiam mi, (1949) la diferenco estis ke mi havis 19 jarojn kaj ŝi 40. Ŝi havis doton, mi jam ne bezonis, intertempe la doto ne plu estis deviga, en tiuj postmilitaj jaroj eĉ nehavigebla. Donadi doton jam ne plu estis “modo”.

Mia avino estis feliĉa ĉar la filino finfine edziniĝis kun la savita doto.

Bedaŭrinde ŝi mortis post unu jaro.

Pri la kiso

La redonita kiso estas unuiĝo,

La kun brakumo donita kiso signifas sopiron.

La psikan malsanon eblas kuraci kun kiso.

(Pensojn de la nekonata aŭtoro esperantigis László Pásztor)

Vilhelmo Fedor

Flavaj kuboŝtonoj

Estis iam en Miskolc unu fiera, longa strato, kiu kondukis de la preĝejo ĝis la vendoplaco. Pri ties flave pompada ŝtonaro oni parolis tutlande, oni alvenis admiri ĝin de multaj landoj de la tero, ja la naturo ne kreis saman koloron alie. Ĝi estis vera miraklo, vera Miŝkolca miraklo. Sed tion oni devas scii, ke tiu strato ne estis ĉiam kolĉika kolora, sed ĝi estis unu el la grizaj statoj. Tamen ĝi estis tiom larĝa, ke ankaŭ du ĉaroj facile povus paradi unu apud la alia eĉ ili povis grand-arke eviti ankaŭ la kurbigit-dorsan oĉjon Steĉjo pene portinta ŝtipojn. La ŝercemaj koĉeroj certatage ĉirkaŭgalopis la maljunulon ekkriegade plengorĝe. Nia kompatinda oĉjo Steĉjo kapturmiĝis tiome pro la ŝerco, ke li ne rekonis la direkton de la antaŭen, kaj ĉefe tiam, se la Sunon kovris nubo. Dum lia fraŭlaĝo li laboris kiel taglaboristo sur la kampoj de sunleviĝo ĝis sunsubiro kaj se li scivolis pri la tempo, ankoraŭ kiom da horoj li devas labori, li nur rigardis al la ĉielo. Li majstre konis la tempokalkulon pri kie staro de la Suno kaj eĉ unu minuton li eraris neniam. Al tiu bezonatis neniu aparato, nur liaj du nigraj okuloj, kono de la naturo kaj humila estimo al la naturo. Sur la blondaj kampoj kaj bonodoraj paŝtejoj li estis feliĉa, sed tiun ĉi feliĉon ŝanĝis bruo, griza polvo de la urbo kaj plendaĉo de la moŝtoj.

Sur du flankoj de tiu vojo kelkloke papaveto ekkreskis. Tiu malsaĝa floro kredis, ke apud la fervoj-repara taluso floras ĝi. Kaj nun ĝi kutimis al la relparoj, nun la florkapoj sur la rompeblaj molaj tig-finaĵoj montris al la urbo, ĉar tiutempe ankaŭ la plantoj estis benitaj pri scivolo.

La flankaj stratoj kondukis de la ĉefstrato kaj dekstren kaj maldekstren same, kiel la arbobranĉoj de la arbotrunko. Ĉiuj stratetoj donis hejmon por unu metio. Riĉhavaj estis tiutempe la diligentaj metiistoj kiuj vivis en belaspektaj dometoj, ŝildo anoncis kie kiuj varoj pretiĝas per faka scio. Frumatene, kiam la koko kokokriis, la diligentaj homoj tiel elsaltis de la lito, kvazaŭ la subiranta Luno, havante ŝercan plaĉon, estus metinta ardaĵojn en iliajn kovrokusenojn. Sed ne nur la metiistoj rapidis por labori, sed jam je la mateniĝo la tuta familio estis maldormanta, el ĉiuj kamenoj oni flugigis densan fumon. La virinoj miksadis en kaldronoj la mason sekretan konsistaĵan, ege malagrablan-odoran, sed tre bone enspezigan el kiu iliaj edzoj pretigis ankaŭ la plej diversajn formojn de kandeloj. Aliaj virinoj tolojn kalandris, kotonon bobenis, aŭ meĉojn tordadis, kvazaŭ Dio estus kreinta ilin je tiuj ĉi laboroj. Kaj vere ili faris tiujn ege bone, ĉar la kandeloj fandverŝitaj el vakso de la Miŝkolcanoj, ĉiam brulis ĝis fino. La infanoj kuntrenadis, tenis la feron en fajron, kun siteloj de akvo ekvilibrigis sur bordoj de rivereto Szinva, aŭ ludis per la defalantaj ligneroj.

Kontente vivadis la lertaj metiistoj kun iliaj edzinoj, infanoj, pace laborante kaj adorante Dion, pagante la imposton. Oni ne povis pentri pli belan bildon, ol kiam po

dimanĉo – se la Di-sinjoro donis belegan veteron, ĉar la Miŝkolcanoj ne ŝatis la pluvon, la malsekiĝon dum la pluvo – sonorilego de preĝejo de Mindszent vokis la kredantojn partopreni meson. La kadukuloj sidis laŭ la vojo kondukanta apud la preĝejo por rigardi memfidan iradon kaj vestaĵojn de la belaj sinjorinoj, la rafinitan okulumadon al la fraŭloj de la fraŭlinoj, kvazaŭ tutsemajne ellernintus por flirtadi. Ĉar kiel la papavetoj laŭ la vojo, ankaŭ la Miŝkolcanoj estis scivolaj. Pri la plej freŝaj klaĉoj oni povis informiĝi en korto de la preĝejo, la sinjorinoj tiel bekis la famojn kiel la birdetoj la semojn. La klaĉoj ankaŭ algluiĝis al la fraŭlinoj, sinjorinoj, vidvinoj kiel la sukero sur la en mielon trempitan oranĝoŝelon. Tio estis vera trezoro kiam el la grandsinjoraj rondoj disŝutiĝis kelkaj fameroj. Jam estis tagmezo kaj el la aŭditaĵoj estiĝis ĉiam pli ornamitaj fabeloj. Kaj je kiam oni manĝis la varmegan supon kaj pli malfrue la ĉokoladŝaŭmon, jam ŝanĝiĝis la rolantoj, jam estis duba la klaĉo. Sed la Miŝkolcanoj ne bedaŭris tion, ĉar ŝatis kaj sopiris la klaĉojn.

Ekzemple foje oni klaĉis tion pri fraŭlino Elinjo, ke ŝi pro tio promenas kune kun sia akompanantino al strato de la forĝistoj, ĉar deziras gvati en la metiejon kaj ekvidi la fraŭlon Johano, kiu por ŝia koro estas ege kara. La alta fraŭlino provis ĉion por enlogadi ŝian akompanantinon en la flankan straton, kie brulas la fajro de la infero, fleksiĝas la fero. Sed la provado ne sukcesis. Se tiu ĉi larĝa strato povintus kalkuli, tiam kalkulintus miloj da spuroj de ŝuetoj de Elinjo.

La maljuna oĉjo Teĉjo, kiu portis ŝtipegojn surdorse, unue sciigis pri la sekreta celo de la fraŭlino. El ĝi estiĝis tia klaĉo, ke en sekva dimanĉo – Palmodimanĉo – la sinjorinoj serĉante ombron de la tendoj paroladis nur pri Elinjo kaj ĉiuspecaj malbonaĵoj. Kaj tagmeze dum faro de la manĝaĵoj ĉe ĉiuj domoj rakontata estis ke Elinjon obsedis la satana spirito, kiu portas ŝin al la forĝisto. Poste ĉiuj rigardoj deturniĝis de ŝi kaj la nigran vestaĵon portantaj sinjorinoj, vidante Elinjon, tiel ĵetadis sur si mem la kruc-signon, kvazaŭ la diablo estintus en ili. La malfeliĉan fraŭlinon tiel atingis la malbena de la klaĉo, ke ŝi ne kuraĝis eksteriri al la strato. Pro la malĝojo ŝi laboris de frumateno ĝis malfrua vespero apud la teksilo. Ŝi teksis saman longan tolon kia longa estis ŝia malĝojo. Tiu tolo ŝajnis senfina, ĉar je ĉies miro ĝi plektis la tutan ĉambron, tablon, liton, la kuirejon. Poste la tolo elirante trans la fenestro, kovris murojn de la domo, eĉ la ĝardenon kaj ĝiajn plantojn

Post la klaĉado Johano ne vidis plu la fraŭlinon ĉe la vojkruciĝo, kiel ŝi defendas sin de la somera sunradiado per sia puntornama sunombrelo. Li havis grandan doloron, ĉar mankis al li la belega Elinjo. Lia amareco iĝis tiel granda, kiel la nuboj antaŭ tempesto, ja kredis tion, ke ricevis amrifuzon. Li sciis bone, ke ŝi ne povas esti lia edzino, sed vane sciis: La prudento silentas, se la amo regas. Li staris ĉe pordo de la metiejo ĉiutage samtempe, ke tamen li povos ekvidi ŝin. Kelkfoje tiel ŝajnis, ke li vidas ŝin, sed li nur fantaziis.

La klaĉoindustrio tiutempe tiel bele vivis kaj prosperiĝis en Miskolc kiel pli frue neniam. Tiutempe estiĝis modo por iri en preĝejon sabato-vespere kaj ankaŭ dimanĉe, ĉeesti meson. Ĉiam pli kaj pli disvastiĝis la posttagmeza teo-trinkado kiel socia okazintaĵo. La belegaj salonoj, la tabloj kovritaj per damako-tablotukoj similis al vendoplaco, kie oni vendis-aĉetis la novaĵojn. Oni diras, ke la eltrovemaj homoj ankaŭ povis marĉandadi. Ankaŭ en la korto de la preĝejo eblis ekscii pri la per tolo teksita enigma domo, pri la freneza fraŭlino, kiu loĝas en tiu domo kaj pri la revadanta forĝisto fraŭlo, kiu paroladas nokte kun la Luno, tage kun la Vento.

Dume nian oĉjon Steĉjo turmentis la kulp-konscio, ja li estis fonto de la klaĉo. Ĉi tiu fonto iĝis riverego kaj fluegis forte ondonante. La maljunulo cerbumis de mateno ĝis vespero, pensadis, sed ne havis uzeblan ideon. Sed la konscienco estas granda sinjoro. Trioble tri monataj sendormeco, senapetiteco suferigis lin, poste la maljuna Steĉjo decidis fari viziton ĉe Elinjo. Li ekkonis la domon jam de malproksimo, kvankam tio ne similis al domo, plie al grandioza fojnostoko, kiun iuj bandaĝis, ĉar la akra ĉiela fulmoglavo vundis ĝin. Nia heroo tre – tre hontis sin kaj jam de malproksimo kriis:

Elinjo, Elinjo, elvenu!

Sed vane kriadis, frapetis, sed la tolo erstis mola kaj dika kaj la voĉo ne aŭdiĝis trans la tolo. Nia oĉjo Steĉjo iĝis malgaja kaj nenion farante hejmen paŝaĉis.

Nokte de samtago li sonĝis kaj en la sonĝo aperis antaŭ li mem la diablo. Ne scieblas, ke kiel medikamento drinkita brando je la kulp-konscio, aŭ pro malsukceso de la misio tremis tiel forte la maljunulo, kiel la rano en la Miŝkolca galantinopretigita laŭ kutimo de la bona mastrino, kiam dum nokto de Silvestro ĝi rigidiĝas sur la verando. Frumatene li vekigis kaj kredis ege, ke li vere estis en la infero, pluse nudpiede. La diablo nokte tion konsilis al li - pensante, ke li ektimigos la maljunulon kaj helpos du amantajn korojn - ke li iru al fraŭlo Johano por farigi sesoble ses diablo-hufoferojn, ĉar nur ĉi tiel povas danci rapide la inferanoj. Laŭ la konsilo dum la sekva plenluno la maljunulo devos porti la hufoferojn al fino de la larĝa strato al domo de Elinjo kaj ĵeti la hufoferojn en arbuston de anemono de la ĝardeno kaj kiam la arbusto ekflamiĝos, forkuri ege rapide, poste diri al la fraŭlo, ke dum plenluno precize nokte estu li bele vestita sur la plej malproksima loko de la larĝa strato.

La kompatinda maljunulo estis nek vivanta nek mortinta post sia terura sonĝo. Li kuregis kiel povis, bluiĝint-vizaĝe, kaj unuvorte kiel per cent, li rakontis pri ĉio kion petis la diablo..

La fraŭlo ne ŝatis la ŝercon, ja lia patro - de kiu li ellernis la metion - edukis tiel, ke estu li serioza, laborema homo, nur la manoj laboru, per la buŝo manĝu kaj preĝu. Sed nun la fraŭlo ridis tiom bonguste kaj longe, ke je unu momento li forgesis lian malĝojon. El sia gorĝo kiel gejsero eksplodanta rido plenigis la tutan urbon. Oĉjo Steĉjo forpaŝaĉis, sed atentigis la fraŭlon por pretigi tiujn malbenitajn hufferojn, ĉar dum plenluno li volas forporti ilin.

La maljunulo foriris, koron de Johano ĉirkaŭen teksis la araneo de la malĝojo. Kaj ĉar de tiu tago li ne kapablis dormi, dum noktoj li fabrikis la hufoferojn. Tiujn li metis en iun belan keston, pensante, ke ili taŭgos kiel ornamaĵoj sur la pordego.

Alvenis tempo de la plenluno. Nia oĉjo Steĉjo sciis tion sen tio, ke li estus rigardinta al la ĉielo. Ja, la ligo kreita sub ĉielo de Dio estas eterna kaj kvankam forpasis la jaroj, sed ritmon de la naturo lia korbato ankoraŭ respondis. Li surmetis sian solan festan vestaĵon kaj ekiris direkton al la strato de la strato de forĝistoj, rekte al metiejo de la fraŭlo. Antaŭen paŝadante lia ombro antaŭis lin anstataŭ lia sekvo kiel laŭleĝa estus en la fiziko. Li rigardis ŝtele sur la nigran noktokovrilon kaj vidis, ke sur la globa flava pilko, nome sur la Luno la diablo sidaĉis kaj ridaĉis al li. Nia oĉjo Steĉjo denove ektremetis kaj pro la ektimo li ekkuregis tiome, ke li antaŭis ankaŭ sian ombron.

Li tute anheligis, atinginte pordegon de la forĝistmetiejo. Li ne povis paroli, nur frapegis la ferkradon. Neniu venis al la pordego. Li petpreĝetante falis surgenuen kaj tiel ŝajnis, ke la maljunulon ŝatis la anĝeloj, ĉar de du flankoj ili brakoprenis lin kaj sidigis sur brakseĝon de la fraŭlo.

Aŭdante la bruon, la fraŭlo kuris enmanigite ferstangon por mortbati la ŝteliston, ĉar li supozis, ke tiu ŝteliras en la metiejo. Li jam volis frapi tien, kiam ĉe lumo de la Luno li rigardis la tie sidantan, tremetantan, palan maljunulon. La fraŭlo demandis lin, ke kiu vento portis lin tien dum tempo de nokto. La maljunulo respondis, ke ne vento kunportis lin, sed plie la anĝeloj, ja ili havis flugilojn.

La fraŭlo murmuris kolere, ke ŝajne en Miskolc ĉiuj fraŭlinoj kaj kadukuloj pli-malpli frue iĝas frenezetaĵoj. Dezirante bonan nokton, la fraŭlo volis forsendi oĉjon Steĉjon, sed la maljunulo ne lasis sin kaj postulis la hufoferojn. Ili disputis, kverelis, pro kio vekigis ankaŭ sinjorino Terka, - edzino de pli aĝa Johano, patrino de la pli juna Johano -, kaj iĝis tie dum duon minuto granda kverelado, kriado, kiu aŭdiĝis en la tuta strato, eĉ en la najbaraj stratoj. Antaŭ noktomezo loĝantoj de Miskolc vekigis.

La kolera fraŭlo ne povis fari alian ol, transdoni la broditan skatoleton kun la hufoferoj al nia oĉjo Steĉjo. La maljunulo ankaŭ larmis iomete pro la ĝojo, rakontis post la evento sinjorino Terka.

Do, nia oĉjo Steĉjo ekiris el strato de la forĝistoj kaj turnis sin maldekstren, perpiedis al fino de la larĝa strato al domo de Elinjo.

La fraŭlo reiris por dormi, sed sciis, ke ne kapablas dormi, pro tio ankaŭ li iris al la strato, sed ne maldekstren, sed dekstren turnis sin. Li pensis tion, ke efiko de la aero dormemiĝos.

Nia oĉjo Steĉjo ektrovis la arbuston facile, ĉar ĉirkaŭ ĝi disvastiĝis sulfura fumo.

La maljunulo malrapide forigis la tegmenton de la kesteto, elprenis la sesoble ses hufoferojn, ĵetis tiujn en mezon de la pli belajn tagojn ĝisvivitajn anemono-arbusto kaj ne rigardante malantaŭen forkuris.

La diablo atendis nur ĉi momenton. Ĝi surteriĝis tuj kaj dum unu momento metis sur sin ĉiujn hufoferojn kaj dancis rapide tiel, ke la Miŝkolcanoj starante sur du flankoj de la strato mutiĝante gapis tiun.. Eĉ la multjaruloj ne memoris similan iaman okazintaĵon. La diablo ĝuis la de si aranĝitan teatran ludon, kies ĉefrolanto li mem estis. Tiome rapide dancis li batante siajn sesoble ses spronojn kaj hufoferojn al argila bazo de la strato, ke la sulfura polvo ekflugis, kovris la diablon, la konsterniĝinte gapantajn Miŝkolcanojn, entute ĉion kaj ĉiujn flavigis. La diablo haltis nur antaŭ piedoj de Johano. La diablo tiam ekridis kaj diris:

Nu, klaĉantaj Miŝkolcanoj, mi donis moralinstruon nun al vi - kun mia kamarado oĉjo Steĉjo - ĝoju, ĉar hodiaŭ du koroj havos feliĉon. – kriaĉis la diablo – kaj ĵetis sin en la arbuston la kapon antaŭen metite kiu tuj flav-flamiĝis, kaj la flavaj flamlangoj ekbruligis la barilon per tolo kovritan. Malrapide la domo liberiĝis de la tolo kune kun la mebloj, ujoj de kuirejo, la lito. Eĉ ankaŭ mem la belega Elinjo liberiĝis de mallibero de la mem teksita kotono, ja ŝi estis neniam freneza, ne suferigis ŝin spiritoj, sed ŝi estis senkulpa viktimo de la malsaĝa klaĉo.

Elinjo eliris el la domo kaj konsterniĝis ĉar ekvidis, ke ĉion kovras flava polvo. Ŝi ekvidis, ke sur ambaŭ flankoj de la strato la Miŝkolcanoj ŝin rigardas. Unue ŝi timis tion, ke ili denove ekskominikos, malestimos ŝin. Sed ĉar ĉiuj restis mutaj kaj estis kovritaj per flava gluema polvo, ŝi kuraĝiĝis. Paŝante ŝi eksteren tra la pordego ŝi ekvidis la fraŭlon ĉe alia fino de la strato. Ŝi ekĝojante ekploris kiel printempe la pluveto. La larmoj degelis la flavan polvon donitan de la diablo kaj – mirakle – el ĝi estiĝis flava rivero. Fluegis la abrupte estiĝinta grandkvanta akvo kaj kovris ĉiujn ŝtonojn, angulojn. La tuta strato flavigis tiom, ke la Luno hontis sin, ke fine kaŝis sin malantaŭ dikan nubon. Kiam la akvo atingis Johanon, portis lin al sŝ. Li elsaltis de la akvo kuraĝe antaŭ Elinjon. Tie li kisis lipojn de la fraŭlino.

Sekvan tagon ili aranĝis geedziĝan festenon, ĉiuj dancis laŭ ritmo de la muziko kaj ĉiuj sinjorinoj, knabinoj, patrinoj, knaboj, viroj, vidvinoj, geavoj ĝojis, ke Elinjo liberiĝis de la satanaj spiritoj.

La jaroj fluis – pasis, Johano kaj lia belega edzino vivis feliĉe kaj la homoj rapide forgesis la fabelon, en kiu la diablo moralinstruis la klaĉantojn. La onidiron, laŭ kiu „... kamaradaĉas, kiel oĉjo Steĉjo kun la Diablo”, oni ne forgesis, ĉar la Miŝkolcanoj ankaŭ nun multfoje menciadas.

De tiam sezonoj iris -venis, en la urbo okazis torentaj pluvoj, neĝaj vintroj, sed la larĝa vojo meze de Miskolc restis flava-ŝtona kaj ne estis erodita. La Miŝkolcanoj ne forgesis la danĝeron okazigita de ilia klaĉado. Ili neniam plu klaĉadis ankaŭ en korto de la preĝejo kaj la teo-posttagmezoj estiĝis ne modaj.

Se iu tamen havus emon klaĉadi en Miskolc, tiam unue promenu iomete sur la flavŝtonaj stratoj, sed ne miru glitfalante sur sian postaĵon. Kaj se tiu jam sidiĝis sur la kubŝtonojn, rigardu al la ĉielo kaj se kuraĝas agi tiel, ne zorgu pri la diablo sidaĉanta sur la Luno.

(Esperantigita estas de László Pásztor el la hungarlingva libro Miskolci legendák/Legendoj de Miskolc, la komuniko permesita de la aŭtoroj/Kontrolis Jindřiška Drahotová, Ĉehujo)

Karlo Sziklavári

Operludoj en Miskolc en dua duono de la 20a jarcento

- Parto Kvara -

Publiko de Miskolc devis atendi la memstaran operprezentadon ĝis decembro de 1989, post la ĉesigo de la opero grupo, kio okazis en la 1950-aj jaroj. Post la malvenkanta revolucio la propra opero ludo havis altruditan paŭzon kaj tiu povis komenciĝi denove en tempoperiodo de la hungariaj ŝanĝoj – dum jaro de revolucioj de „politika printempo” de Meza kaj Orienta Eŭropo.

Gespektantoj de la „Carmen” fine de 1989 ekscitinte kaj maltrankvile iris en teatron pro okazintaĵoj de evolucio de Rumanio. Komence de la publika ĉefprovo (21. decembro) post vortoj de dirigento, Ladislao Molnár la ĉeestantoj starante esprimis ilian estimon antaŭ oferbuĉoj de ribelo de Temesvár. Kiel signo de estimo kandeloj lumis kaj dum la paŭzoj la ĉeestantoj paroladis ne pri la muziko, sed pri la orient,-kaj mezeŭropaj situacioj, pri la historia sortoŝanĝo.

Grandioza entreprenado de la 1989/1990. sezono Miŝkolca estis la „armen”, kies provoj komenciĝis fine de aŭgusto, sed la antaŭpreparoj daŭris ĝis printempo. De jaro 1988 Judita Galgóczy estis ĉefreĝisoro de la teatro, kiu kiel unua tasko volis revivigi la operludon: dank’al ŝi ka Ladislao Molnár, dirigento, ke ekokazis prezentado de „Carmen.” La premiero faris landan eĥon. La kritikistoj deklaris rekonante pri reĝisoro, ĥoro, orkestro, solkantistoj. (Ĉefe oni laŭdis Martan Lukin, Carmen-on de la dua distribuo de roloj.) Speciale estis grava la prezentado, ĉe originalan varion (sen recitativoj) de la opero oni prezentis unufoje en Hungario. Galgóczy metis en centron dramojn „Carmen ka Don José, citante al la destino saman praan tragikan atmosferon. Ĉefverko de Bizet estis prezentinte sepfoje ĝis majo de 1990.

Oficiala tempo de la premiero estis: 22. decembro 1989. per unua distribuo de roloj:

Carmen: Anna Molnár; Don José: Győző Leblanc; Escamillo: Stefano Ábrahám; Micaela: Katarina Körei.

Antaŭpremiero” – 21. dec. – dua distribuo de roloj: Carmen : Mára Lukin; Don José: Stefano Vadász; Escamillo: Ladislao Egri, Micaela: Edita Pirisi.

La decembran teatraĵon dirigentis Ladislao Molnár, la pli malfruajn Andreo Gillei kaj Petro Kalmár. Kunlaboris: ĥoro de teatro, orkestro de la teatro kaj dancistaro de teatro, infanĥoro de muziklernejo „Egressy Béni”, ĥoro „Bartok de Miskolc, kaj membroj de Simfonia orkestro de Miskolc. La dekoracio kaj kostumo estis laboraĵoj de Rita Dévényi.

Judita Galgóczy reĝisoris du miŝkolcajn operprodukciojn de komenco de la 1990-aj jaroj, ankaŭ „Trobadoron kaj „Honoron de la kamparano, kies premieroj estis: 22. marto 1991 kaj 17. aprilo 1992. Pluaj grandteatraj operprezentadoj estis ĝis la jarmil-ŝanĝo: „Traviata: 6. maj. 1994. reĝisoris Stefano Majoros, prezentinte reen 31. jan. 1998. „Magia fluto”: 26. maj. 1995. reĝisoria Johano Sikora. „Tosca” 24. maj. 1996. reĝisoris Stefano Majoros, prezentinte reen 27. febr. 1999. Baŭno Bánk: 20. nov. 1998., reĝisoris Árpád Jutocsa Hegyi. „Bohemio” 18. febr. 2000. Reĝisoris Árpád Jutocsa Hegyi. „Rigoletto: 17. nov. 2000, reĝisoris Gregorio Kesselyák.

Aŭtune de 1998 denove opersekcio estiĝis en Nacia Teatro de Miskolc, kiu dum kelkaj jaroj sukcese funkciis. (unua premiero de la sekcio estis la „Baŭno Bánk.)

Konsiderante la malfacilajn cirkonstancojn de la 1950-aj kaj 1960-aj jaroj, la malfacilajn aferojn de la operludo kaj simfonia orkestro, ni povas diri post kelkaj jardekoj la subajn: la simfonia orkestro de Miskolc iĝis unu el la plej konata, internacia renoma orkestro de la regiono. Al la Nacia Teatro de Miskolc ligoĝas aranĝaĵserio de Internacia Operfestivalo de Miskolc, kiun partoprenas de jaro 2001. dum ĉiuj junioj gereprezentantoj de la hungara kaj eksterlanda muzikarto. Jam ankaŭ en 2001. ĝi donis hejmon al specialaj mondopremiero: 24 romancoj de Verdi estis prezentinte unufoje antaŭ publiko en la Ĉambroteatro la 21-an de junio 2001. La Festivalo signifas solan konstantan ludejon de „ Fortikaĵo de bluan barbon havanta princo” de Adalberto Bartók. – Kaj ĉi tio estis la unu el la plej esperplena modelvalora iniciato de la hungara kultúra vivo dum la jarmil-ŝanĝo.

Aldono

Tri ĝemetoj de Miŝkolc

(Aperis en gazeto „Vivo kaj Literaturo-la 13-an de decembro en 1957.)

Nia laŭmezura dua urbo, Miskolc estas la plj senproportia. Ĝi etendiĝas ĉe piedo de monto Avaŝ kaj enspiras la fulgan aeron de kamenoj de la fabrikoj. Ĝi estas sama kiel unu subite kreskinta adolesko. En jaro de la proksima pasinto, dume ĝi komencis iĝi plenkreska, estis zorgoj, kiuj ankaŭ nun ekzistas apud la altfornoj kaj uzinoj, atendante la helpon. Kaj nun admirante ĝian plimultiĝantan sanon de Miskolc, aŭdante de ĥoron de la prosperiĝo, mi aŭdis tri ĝenantajn ĝemetojn: tri plendojn de kulturo de Miskolc.

La unua ĝemeto aŭdiĝis en oktobro de la pasinta jaro, ĉar ĝis nun staras en arteferitaj ruinoj unu kolonfronta konstruaĵo en la strato Széchényi. Ĉi tiu konstruaĵo estas la teatro, pri kiu oni konstatis, hontigante la centjaran konstruaĵon, ke estas fajrodanĝera kaj estas inda por malkonstrui. Por renovigi – jam nun tiel ŝajnas, ke la decido estas definitiva, ĉar la urbo rezignis pri la teatro kaj Miskolc jam nur gemetante parolas pri la teatro.

Dum la pasinta jaro oni komencis malkonstrui restaĵojn de la konstruaĵo por ke la pluvo kaj vento plu malbonigu la ruinojn. Post kelkaj tagoj sekviĝis la kontraŭevolucio kaj ĉesis plano de renovigo de la konstruaĵo. Sed la konstruaĵo volis vivi kaj kriis por helpi finance. Sed estus financa garantio por konstrui la teatron, ja multloke konstruiĝis plilastatempem reprezentativaj teatrejoj. Sed tiun oni utiligis ne laŭcele, ekz. la Kulturhejmon de Mezökövesd dek fajrobrigadanoj ricevis kiel duŝejo!

Spite de ĉi tiuj la teatraĵoj okazas senpaŭze sukcese apud la ruinoj de la Ĉambroteatro, kie 340 gespektantoj atestas tion, ke la scejo estas malgranda, ne estas ŝnurara subtegmento kaj kurteno de la scenejo estas trua, seĝoj de la spektantaterejo grincas. Alia edeno de geaktoroj de la teatro estas la Kulturhejmo de Diósgyőr, kiu estas iomete pli granda, sed ankaŭ pli malbongusta. Kaj ĝi esta pli malproksima de la interna urbo.

Sur ĝia scenejo daŭras la reen prezentinta opereto „Bajadéro.” TiborFehér („Dika Fehér”) inprovizante kantis unun ŝercan kabaredkanton pri la lokaj rilatoj de la teatro, dirante la realaĵon: aŭdiĝas eksplodigo de la ŝtonminejoj, poste flugas aviadiloj super la ĉambrego, kiu eĥas en la ĉambrego, pro kiuj la gespektantoj de la 10-17. vicoj kvazaŭ sidintus en unu trogo kaj nenion vidis kaj nenion aŭdis.....

Kaj inter ĉi tiaj cirkonstancoj ludas la geaktoroj sukcese, kiuj ne havas loĝejon, loĝas en subluaĵo, aŭ ili estas litluantoj. La subluaĵo kostis 400-500.- forintojn.

Estas mirinda ilia obstina persisto, kiel ili volas labori. Paŭlo Jákó, direktoro-ĉefreĝisoro kaj ekonomia estro, aŭtoro organizas literaturan scenejon, studion por deklari, pruvante, ke la aktoraro de Miskolc volas vivi, labori ankaŭ pli malfrue.

La dua ĝemeto forlasas buŝojn de artistoj de la peniko, vekante po matenoj. Ilia sonĝo estas ripetidantaj. Ĝi temas pri unu domo, kie ili vivas, sed ne ili havas. La domon ili havis iam en la 1920-aj jaroj, kiam Rezső Burghardt instruis por pentri la junulojn en artistkolonio de Miskolc. Sed en 1951 jam la konstruaĵon havis la Konstruaĵmaterialon Liveranta Entrpreno, kiu ne estis jam pentrinda bildo.

Du jaroj de la Perdinta Paradizo denove malfermiĝis por kvin pentristoj, kiuj ricevis hejmon en la artistkolonio de la Minejindustria Studenthejmo. Ekde kiam daŭras la transformiĝo kaj disputo. Tiuj domoj estas eluzitaj, la teknika prizorgo ne estas bona kaj estroj de la artistkolonia kaj Studenthejmo ne kapablas kunlaboro. La studentoj dormas en la atelieroj kaj ne esta ejo por lerni. Kaj bildoj de la kvin pentristoj (du pentristoj estas Munkácsy-premiaj kaj tri estas Derkovits-premiaj, kiuj landfamaj artistoj, tridek jaraj, vicorde: Kolomano Csabai, Ladislao Lukovszky, Jozefo Vati, Julio Feledi Imre Tóth) trovus lokojn pli bone en landa ekspozicio de Miskolc, ol en la artistkolonio. Emerigo Tóthne havas atelieron, kies naskiĝis infaneto, lia loĝejo esta malhela kaj por pentri li iras al Vati. Kaj Sigmundo Imreh, la fama pentristo ne ricevis lokon en la ertistkolonio. La kompetenta ministerio ĉiam nur promesasdas por elloĝigi la lernantojn, ja tie kvar artistoj povas ricevi lokojn.

La tria ĝemeto jam estis muzika, temas pri la opero. Oni organizis en 1953 laŭ la landa muzika malcentralizado kaj de februaro de 1954 averaĝe dum dudek teatraĵoj prezentis la programojn. Pojare dum 40 vesperoj oni prezentis teatraĵojn kiel ekz. la Tosca kaj Trobadoro, kiujn sume partoprenis 18 mil gespektantoj. En 1954 okazis malpliigo de la nombro de geaktoroj kaj pro tio ĉi ekrestis nur dutriono de la talenta etato. Ekde kiam la ĥoro, la dancistaro kaj la orkestro nur povis funkcii kiel epizoda figuranto. Samtempe oni ne povis okupigi ilin kaj sen koncerto kaj memstara programo kvazaŭ ekzistintus neleĝe.

Kaj plej lastatempe, kvankam ilia kontrakto estas valida ĝis fino de la sezono, la departementa konsilantaro, aludante zorgojn de la konstruaĵo, la malboniĝintan operon de Miskolc tute ĉesigis. Tio estas fakto, ke en ejo de Diosgyőr la operteatraĵoj estas rare vizitataj, sed tio estas komprenebla pro la menciitaj kaŭzoj. (Ekde kiam oni malvalidigis kontrakton de la opergrupo.)

Dume la operludoj prosperiĝas en niaj aliaj urboj, Miskolc-on oni senhaviĝis de la kulturo kaj la gekantistoj, gedancistoj, gemuzikistoj foriras el nia urbo havanta pretendeman publikon por serĉi aliajn okupiĝojn, ĉar volas esti (morale kaj finance) aprecitaj membroj de socio de departamento Boršod.

Nome temas pri malestimo de la evoluon deziranta animo kaj pri bagatelema nekompreno de la artaj aferoj.

Georgo Hárs

Ŝercoj

En la frenezulejo

La malsanulo skribadas entuziasme en la frenezulejo.

Kiun ni skribas? Kiun ni skribas? – demandas la vizitanta profesoro afable.

Mi skribas leteron al mi mem.

Pri kio ĝi temos?

La malsanulo rigardas la kuraciston mirante pro tio.

De kie mi povas scii, ja mi ankoraŭ ne ricevis tiun.

La ĵaluza edzino

La ĵaluza edzino traesploras potage kompletojn de vestaĵojn, palton de sia donhuana edzo. Se ŝi trovas sur tiuj virinan kapharon, tiam kverelado sekviĝas. Sed iutage ŝi esploras vane. Pro tio ŝi kolere perdas la sinregon:

-Ludoviko! Jam nek la senharajn virinojn vi lasas por trnkvili?

Post la nuptonokto

Post la nuptonokto la juna edzo ŝteliras en la kuirejon por kuiri la matenan kafon al la karulino. Dume la novedzino vekiĝas, la nigra kafo jam vaporas sur la pleto antaŭ la edzino. Ŝi gustumas la en tason estantan nigran kafon kaj tuj fulminas kontraŭ la edzo:


-Ĉu nek kafon vi kapablas kuiri?

Esperantigis László Pásztor

Vidor (Bonhumura) – Festivalo en urbo Nyíregyháza

Fine de aŭgusto estis aranĝis la 11. Bonhumura Festivalo en urbo Nyiregyháza. Okazis tie ankaŭ ĉi-jare teatraj ludadoj kaj en teatro kaj surstrate, koncertoj, ekspozicioj kaj filmoprojekcioj. La plej grandan parton de la programoj la publiko povis rigardi senpage. La organizantoj invitis roli la plej konatajn elstarulojn de la tutmonda muziko kaj popolmuziko.

/Hungare pri tio: <http://richpoi.com/cikkek/kultura/vidor-fesztival-augusztus-vegen-nyiregyhazan.html/>



NORDHUNGARIA INFORMO

Pásztor László, Pásztor Lászlóné H-3530. Miskolc, Arany János u. 35. 4/2.

Tel.: + 36 70 206 1739

Tel.: + 36 70 570 8895

Tel.: +36 46 738 982

Retpošto: pasztorlaszlo.adri@hdsnet.hu

Retpaço: <http://kiralylajos.uw.hu>